

EL POPOLA ĈINIO

中國新道

1998

ISSN 0032 - 4361



**Post senlaboriĝo
Kian rolon ludas konfuceanismo
en la moderna socio?
*Nova eltrovo de stonkavernoj en Ali***



Ciklameno

Foto de CONG XIANSHEG

INTER NI

Partoprenintoj de la 82-a UK en Aŭstralio eble aŭskultis du prelegojn pri Konfuceo. Ni publikigis en tiu ĉi numero partojn de la prelegoj. Nia revuo jam prezentis la vivon kaj penson de Konfuceo, granda ĉina pensulo, edukisto kaj politikisto. Sed ni ne multe konigis la influon kaj utilon de lia filozofia penso en la moderna vivo. Do jenaj du artikoloj donos ion tiurilate. "Kian rolon ludas konfuceanismo en la moderna socio?" temas pri la influo de konfuceanismo en modernaj socia vivo, homaj rilatoj, etiko kaj eduko; "Konfuceanismo kaj orienta ekonomio" tuŝas demandojn ne nur pri Ĉinio, sed ankaŭ pri Japanio, Koreio kaj Taiwan de Ĉinio, kie konfuceanismo multe utilas al moderna ekonomio.

Ekde 1992, ĉiu turisma jaro en Ĉinio havas temon, ekz. "Ĝuu montojn kaj riverojn" en 1993, "Ĉinio — nova feriejo" en 1996. Do kio en 1998? La titolo de la artikolo "Vizitu ĉinajn

urbojn kaj vilaĝojn en 1998" klare montras la temon, kio signas la leviĝon de nova turisma programo: partopreni la lokan vivon. Multaj frukto- kaj legom-ĝardenoj bonvenigas la turistojn per "libera plukado". Se vi interesiĝas pri tio, vizitu Ĉinion.

En la 11-a numero de 1997 ni raportis pri ŝanĝiĝoj en ĉinaj ŝtataj entreprenoj: maldungi superfluajn laborulojn, plialtigi profiton kaj reenoficigi la senlaboriĝintojn por alia entreprenado. Por koni, kiel vivas la senlaboriĝintaj virinoj, legu "Defio al senlaboreco" en tiu ĉi numero.

"San-protektado en printempo" en la rubriko "Por via sano" prezentas vivspertojn de ĉinoj en multaj generacioj, kaj laŭ la teorio de la ĉina medicino ili estas efikaj. Se vi aplikos en via ĉiutaga vivo protektajn metodojn taŭgajn por via sanstato, eble tio helpos vin.

La Red.

El Popola Ĉinio

3 [474] 1998



Patrino kaj filo

Foto de Han Hong

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"


Direktoro: Hou Zhiping

Adreso: P.O.Kesto 77,
Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso:
+86-10-6832 1808

ENHAŬO

- | | | | |
|----|----------------------------------|----|-------------------------------|
| 2 | INTER NI | 25 | NUNTEMPA BELARTO: |
| 4 | Post senlaboriĝo | | Ponto liganta ĉinan kulturon |
| 6 | EKONOMIE: | | kun la okcidenta |
| | Nova provo; Ĝardeneska | 28 | LAŬ LA SILKA VOJO: |
| | kvartalo sur skoriejo | | Kaŝi — plej okcidenta urbo |
| 8 | Doktoro de infanĝardeno | | de Ĉinio |
| 9 | Kian rolon ludas | 36 | ĈINA KULTURO: |
| | konfuceanismo en la moderna | | Lako kaj lakmetiarto |
| | socio? | 38 | JUNULARO: |
| 10 | Konfuceanismo kaj orienta | | Li eniris en senvivejon |
| | ekonomio | 40 | EL ĈINAJ GAZETOJ |
| 12 | SUR NIA LIBROBRETO: | 42 | Vojo al Bermuda |
| | Listo de libroj ricevitaj de EPĈ | 44 | ORDINARAJ ĈINOJ: |
| | kaj ĈEB (II) | | Ĉampionino en rulseĝo |
| 13 | ORIGINALE VERKITAJ: | 46 | Kangding hodiaŭ |
| | Filozofio kaj realo (Poemoj) | 48 | Ĉarmo de <i>huĉin</i> -istino |
| 14 | ESP-NOVAĴOJ | 49 | POR VIA SANO: |
| 15 | POR KOMENCANTOJ: | | San-protektado en printempo |
| | Alko kaj gasmasko | 50 | ĈINAJ METIARTAĴOJ: |
| 16 | Nova eltrovo de ŝtonkavernoj | | Ruĝa skatolo kun gravuritaj |
| | en Ali | | drakoj kaj ondoj |
| 20 | Vojaĝu al ĉinaj turismaj urboj | 2 | Ciklameno |
| | kaj vilaĝoj en 1998 | | SUR LA DORSKOVRILO: |
| 21 | EN ĈINAJ URBETOJ: | | [FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ] |
| | En urbeto de ledaĵoj | | Preĝejo kun sonorilturo en |
| 24 | TEMO PROPONITA DE | | Hakarp, Svedio; |
| | LEGANTOJ: | | Riegersburgo de Aŭstrio |
| | Buterteo, oleteo kaj laktoteo | | |



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- | | |
|------------------|------------------------|
| 1. Yangpu (p. 7) | 4. Ningxia-a Huj-nacia |
| 2. Xinji (p. 21) | Aŭtonoma Regiono |
| 3. Ali (p. 16) | (p. 24) |



Orkestro el senlaboriĝintaj virinoj

JIA FA:

Post senlaboriĝo

NUN senlaboreco jam ne estas fremda por ĉinoj. Nia revuo iam publikigis koncernan artikolon. Vere, tiu problemo estas multe atentata de la publiko en Ĉinio. Ĉi-sube vi konos kelkajn virinojn kaj scios, je kio ili sin okupas post senlaboriĝo.

Eĉ hodiaŭ Zhao Fengxia (Ĝaŭ Fengŝja) estas maltrankvila, kiam ŝi rememoras la matenon antaŭ 3 jaroj, en kiu ŝi senlaboriĝis. Tiutage ŝi kantante en vento iris al la fabriko de viandaĵoj, en kiu ŝi laboris. Ekster sia atendo, ŝi subite vidis sian nomon en la listo de senlaboriĝontoj kaj ŝi preskaŭ svenis. Ŝi stumbe revenis hejmen. Pro la "maljusta traktado" ŝi tute perdis la apetiton kaj ne povis endormiĝi. Ŝi malsaniĝis kaj kuŝis en lito pli ol unu monaton.

Kiam ŝiaj familianoj mal-

trankvilis pro ŝi, la fabrikestro diris al ŝi, ke por solvi la problemon de vivtenado de la senlaboriĝintoj, la fabriko ellaboris planon por ili vendi varojn de la fabriko kun privilegio. Jen ŝi enviciĝis inter la vendistoj de la fabriko. Komence ŝi estis tre ĝenata. Antaŭ la aĉetantoj ŝia koro forte batis kaj ŝi povis diri nenion. Iom post iom ŝi lertiĝis en vendado. Ŝi sentis grandan ĝojon, kiam ŝi unuafoje forvendis unu kilogramon da kolbasoj. Post kelke da monatoj ŝi rikoltis pli da sukcesoj: Ĉiutage ŝi forvendis 100 kg da kolbasoj kaj per tio ŝi superplenumis la taskon. Zhao tre domaĝis la sukcesojn. Foje, je la 5-a matene, ŝi tricikle transportis varojn, sed pro glitiga vojo post neĝado, la triciklo kun pli ol 50 kg da varoj renversiĝis sur ŝian korpon, tiam survo-

je troviĝis neniu pasanto. Ŝi, eltenante akran doloron, elrampis el sub la pezaĵoj, rapide kolektis la disĵetitajn kolbasojn. Kvankam la kolbasoj estis bone pakitaj, tamen ŝi portis hejmen la makulitajn kaj ŝia tuta familio formanĝis la kolbasojn la tutan semajnon. Ŝia infano diris, ke la familio pasigis "feston de kolbaso".

Nun Zhao estas la plej eminenta vendistino de la fabriko. Ŝi diris kun rideto, ke la fabriko ne forgesis siajn laboristojn en grandaj malfaciloj, sed male, ĝi helpis ilin en serĉo de laboroj, tial la laboristoj ne malkontentis pro perdo de la antaŭa laboro, fakte ili helpis siaflanke la fabrikon laŭeble por kune venki la malfacilojn. Gvidate de Zhao, 50 senlaboriĝintaj virinoj fondis vendejon, kies jara vendovaloro

konsistigis 63% de tiu de la tuta fabriko.

Ankaŭ Gu Qin senlaboriĝis. Komence ŝi ne volis serĉi novan laboron, sed restinte hejme nur 18 tagojn ŝi jam ne povis plu elteni tion. Ĉar la 3 membroj de ŝia familio estis vivtenataj de ŝia edzo per ties salajro, tial ŝi devis esti ŝparema. Foje ŝia juna filino deziris glaciaĵon, sed ŝi domaĝis la monon kaj ne aĉetis ĝin. Rigardante la filinon, ŝi profunde ĉagreniĝis. Ŝi do partoprenis en ekzameno por aliĝi al virina orkestro de la laborista domo. La orkestro estis fondita speciale por la senlaboriĝintaj virinoj. Antaŭe Gu Qin ne konis muzikajn notojn kaj ŝi, 40-jara virino, devis lerni blovi aldokornon de la komenco. Tio estis vere malfacila. Tiam estis varma somero. Ĉiutage ŝi blovis aldokornon 7-8 horojn. Komence ŝi blovis plenforte kaj laciĝis ofte pro longa starado, kaj plie, ŝi blovis malbelsone. Ŝi do ekzercis sin en senhoma loko. Foje ŝi blovis ĉestrato, la pasantoj misopiniis, ke ŝi estas almozulino kaj donis al ŝi moneron. Post 3 monatoj la orkestro ekskluzive el senlaboriĝintaj virinoj unuafoje ludis kune kaj ekster atendo ĝi sukcesis. La ludintoj mem estis mirigitaj. Ili ĉirkaŭbrakis unu alian kun larmoj kaj ĵetis la dirigenton alten pro ĝojo. Kvankam Gu Qin enspezas ankoraŭ malmulte, tamen ŝia enspezo kovras la elspezon por la familio. Ŝi diris: "Por mi senlaboreco ne estas katastrofo, sed nova ŝanco por plene disvolvi mian talenton."

Ja estas vere, ke neniu deziras senlaborecon, tamen la sperto de Gu Qin pruvis, ke ĝi donis ŝancon ekspluati kaj disvolvi sian talenton. Mi intervjuis alian laboristinon nomatan Zhuang Hongwei, en kies familio estas 4 gemaljunuloj, tamen 3 el ili suferas de kancero, kaj plie, la familio estis malriĉa. Post kiam ŝin trafis senlaboreco, ŝia familia vivo fariĝis pli mizera kaj ho ve, ĝuste

tiam ŝia filo malsaniĝis kaj en-hospitaliĝis. Ĉio ĉi tio forte turmentis ŝin. Ŝi ploris laŭte. Kial la vivo tiel ĉikanis ŝin? Ŝi pensis, ke ŝi ne povas vivi plu depende de la ŝtata subvencio kaj ŝi devas penadi por sin liberigi el la embaraso. Ŝi do ekfunkciigis manĝejon, vendis vestojn en alia loko, riparis biciklojn ktp.

En la pasinta jaro ŝi kaj ŝia edzo kune vizitis teknikan lernejon, funkciigatan ekskluzive por senlaboriĝintoj. Ĝi estas destinita por instrui diversajn teknikojn, por ke la lernantoj serĉu novan laboron. En la lernado ŝi komprenis multe da novaj nocioj, kiaj reguligo de la industria strukturo, terciara industrio, loĝkvartala servado kaj dommastrumado. Poste en ĵurnalo ŝi legis artikolon pri kompanio de legom-purigado kaj informiĝis pri la kuireja revolucio kaj sociigo de la hejmaj laboroj en aliaj landoj. Ŝi do pensis, ke Ŝanhajo estas granda urbo, kie la viv-ritmo fariĝas pli kaj pli rapida kaj oni deziras pli da liberaj horoj. Koncerne la dommastrumadon, ĝi estas bone farata de la 30-40-jaruloj. Ŝi do decidis funkciigi servejon de legom-purigado.

Ŝi pruntis 10 000 juanojn kaj

luis domon kun 28 kvadrataj metroj. Maje de la pasinta jaro ekfunkciis la Servejo de Onjo Zhuang por Legom-purigado. En la komenco tie laboris nur 4 homoj kaj ĝi servis por 6 klientoj, kiuj ĉiuj estis ŝiaj najbaroj. Ŝi kaj ŝiaj koleginoj aĉetis, purigis, tranĉis kaj pakis legomojn kaj transportis ilin al la klientoj, dum ili pagigis al lastaj je 10% pli multe ol la legom-prezo. Nun la servejo havas pli ol 300 konstantajn klientojn, kaj plie, ĝi havas legombazon, komputilon, telefakaparaton, aŭton kaj funkciigas 5 ĉenbutikojn. Zhuang ja estas fiera, ĉar ŝiaj 100 koleginoj senescepte estas senlaboriĝintaj virinoj kaj ĉiu ajn enspezo estas gajnita de ili per la manoj. Ŝi konigis al mi, ke por helpi la senlaboriĝintajn virinojn en la servejo la registaro pruntis al ili 240 000 juanojn. Post nelonge la servejo ekfunkciigos sian filion en Pekino kaj tiam pli da homoj ĝuos la fervoran servadon de Onjo Zhuang.


Zhao Fengxia, Gu Qin kaj Zhuang Hongwei ĉiuj estas ordinaraj ĉinaj laboristinoj. Kiam ilin trafis senlaboreco, ili ne timis ĝin, sed obstine defiis la sorton. Ilia vivvojo iasence donis al ni inspiron en la homa vivo. ■

En servejo de legom-purigado



Nova provo

ZHENG ZHENJIE



Petrolo-kajo de Yangpu

NORDOKCIDENTE de la provinco Hainan situas Yangpu. Ĝi limas la maron kaj ĝia peco da tero de 30 kvadrataj kilometroj estas tre atentata de la publiko de la lastaj dek jaroj, ĉar en 1988 tiu terpeco estis luigita al la Limigita Kompanio Kumagai-Gumi (Hongkong) por 70 jaroj, kiel ekonomia ekspluata regiono libera de la provinca administrado.

VIRGA TERO

Yangpu, 190 km for de Haikou, ĉefurbo de la provinco, estis sterila tero. Antaŭ 15 jaroj mi vidis, ke tie ambaŭflanke de vojoj kreskas ekskluzive kaktaj kaj dissemiĝas groteskaj ŝtonoj.

Ĝi havas tamen siajn naturdotitajn superecojn: Vasta golfo kun marborda linio pli-ol-100-kilometra, ne ŝlimanta nek glaciiganta; la teritorio etendiĝas tri km en la maron, kiel giganta rostro, kiu ŝirmas la havenon kontraŭ ventoj norda kaj okcidenta. Eĉ kiam furiozas tajfuno, la haveno kvietas kiel kutime.

La golfo, kun meznombra profundo de 14 m kaj plej granda profundo de 27 m, povas havi 26 profundakvajn ankrejojn por 20 000-100 000-tonelaj ŝipoj.

En la maro proksime de Yangpu estas granda rezervo de naturgaso, nafto, salo kaj titano, kio prezentas belan perspektivon de koncernaj industrioj.

SENPRECEDENCA FARO

Maje de 1988, la provinca registaro montris tri eblecojn de disvolviĝo surbaze de la fakto, ke la industrio kaj agrikulturo de la provinco estas sufiĉe malfortaj, t.e. disvolviĝo de industrio, terkul-

turado kaj turismo. Tiam la ĉina registaro investis por ĝi malmulte. Sekve, antaŭ ĉio, necesis solvi la problemojn, kie akiri monrimedojn bezonatajn por komenci la konstruadon kaj per kiu entrepreno rapide havigi al si multe da monrimedoj por sin disvolvi.

En la sama monato la provinca registaro luigis al la Limigita Kompanio Kumagai-Gumi (Hongkong) 30 kvadratajn kilometrojn da tero de la ekonomia ekspluata regiono en malalta prezo por 70 jaroj, cele gajni grandan investon kaj altan profiton.

Kompreneble, en Ĉinio estis senprecedence luigi ŝtatan teron al fremda kompanio kaj lasi ĝin ekspluati sen ia ajn limigo. Tial,

tuj post la subskribado de la interkonsento leviĝis demandoj. Iuj eĉ opiniis, ke tio tuŝas la suverenecon de la ŝtato.

Tamen la malakordo de opinioj ne malhelpis la penadon por starigi la ekspluatan regionon. Kaj marte de 1993 komenciĝis la konstruado, kio markis novan provon en pordomalfermo de Ĉinio.

YANGPU HODIAŬ

En la lasta oktobro mi refoje vizitis la lokon.

Ĝi estis latise ĉirkaŭita, kiel la plej granda doganlibera regiono de Ĉinio.

Tie ne videblis kaktaj groteskaj ŝtonoj, sed leviĝis domegoj, kiaj financa domego kun bluj vitromuroj, komerca domego kaj 28-etaĝa pensiono.

Ĝis la fino de 1996 la Limigita Kompanio Kumagai-Gumi (Hongkong) investis pli ol kvar miliardojn da Hongkong-aj dolaroj por fari konstruadon de bazaj instalaĵoj: elektrejo kun generatora kapacito de 315 000 kilovattoj kaj kun dizeloleo kaj naturgaso kiel fuelo; akvokondukilaro kaj kloaka tubaro; poŝta kaj telekomunika reto el program-rega telefonio kun 2 200 lineoj, sistemo de 240 cifer-mikroondaj komunikaj linioj, radiovoka stacio kaj 150 porteblaj telefonoj, per kiu oni povas facile komunikiĝi kun personoj en diversaj partoj de la mondo. Nun estas finita la unuaperioda konstruado de la haveno Yangpu kaj lanĉita la moderna aŭtovojo inter Haikou kaj Yangpu.

Mi intervjuis provincestron s-ro Ruan Chongwu (Ĵuan Ĉong'u). Li diris, ke en la venontaj 15 jaroj Yangpu fariĝos moderna havenurbo kun 400 mil loĝantoj, en plena harmonio inter tropikaj pejzaĝoj kaj novtipa ekonomia strukturo. ■

Ĝardeneska kvartalo sur skoriejo


de JI PING

ANTAŬE la Fera-Ŝtala Kompanio de Taiyuan havis skorian monton kun areo de du kvadrataj kilometroj, kiu formiĝis duonjarcenton post ĝia fondiĝo en 1934 kaj kies plej granda alto atingis 23 metrojn. Kiam ventis, levigis polvo kaj vualis la urbon. La kompanio planis starigi alian skoriejon, sed pro timo, ke aperos nova fonto de poluado, ĝi ne efektiviĝis la planon.

Komence de la 80-aj jaroj maljuna laboristo Li Shuangliang proponis al la kompanio la projekton: Sen ŝtata subvencio oni konstruos parkon tie en sep jaroj. Antaŭ tio li esploris la skoriejon kaj kolektis 500 kg da neuzbla ŝtalo el 10 tunoj da ŝtala skorio. Laŭ lia kalkulo, en la skoria monto estis granda kvanto da neuzbla ŝtalo. Li opiniis,

Por efektivigi sian projekton Li Shuangliang faris la jenon: Unue, kolekti neuzblan ŝtalon kaj vendi ĝin por laborpago, transporto kaj monpremio; due, aĉeti instalaĵojn per la mono ricevita el vendo de senutila skorio; kaj trie, diserigi komponantojn de senutila skorio por plene utiligi ilin.

Por malhelpi leviĝadon de polvo de sur la skoria monto la laborantoj faris ekster ĝi altan ventoŝirman deklivon el cemento kaj brikoj el senutila skorio. Sur la deklivo kaj skoriejo kreskas arboj kaj dislokiĝas kioskoj, florbedoj kaj fontanoj, kiuj interkomunikiĝas per longa koridoro kaj zigzaga ponto.



Li Shuangliang



Skoriejo anstataŭita de bela parko

ke la enspezo el vendo de ĝi povos kovri la elspezon por ŝanĝi la skoriejon.

La kompanio akceptis lian proponon. Li varbis 500 laborulojn, kies tasko estis eksplodigo, kolektado de neuzbla ŝtalo, transportado de senutila skorio en montvalon kaj ŝuto de tero sur ĝin por fari kampon...

Dank' al ilia pli-ol-dekjara laboro, la skoriejo mal-kreskis de du kvadrataj kilometroj al 0.54. En la loko, kie estis la skoriejo, nun staras dudekelkaj loĝdomoj, element- kaj mezlernejoj kaj fabrikoj, kie laboras centoj da kripluloj. En la pasintaj dudekelkaj jaroj Li Shuangliang kaj liaj kolegoj ne nur enspezis cent milionojn da juanoj por la kompanio, sed ankaŭ neniigis fonton de poluado por la urbo.

Gvidate de Li Shuangliang, la laborantoj ekfunkciigis malgrandajn ŝtalojn, cimentojn kaj brikojn por akurate trakti ŝtalan skorion.

Maje de 1985, la Media Programo de UN honoris lin kiel unu el la 500 medi-protektaj eminentuloj en la mondo. Nun, kiel emerito, li ofte vizitas la kvartalon kaj skoriejon. ■

Doktoro de infan- ĝardeno

SUR televidekrano mi vidis 6 amindajn infanojn, kiuj sub gvidado de psikologia doktoro agas multe pli lerte ol samaĝaj infanetoj. Antaŭe ĉinoj opiniis, ke la infanoj estas edukitaj nur tiam kiam ili atingas 2-3 jarojn, sed la doktoro edukas infanojn tuj post ilia naskiĝo. Li prenis 6 novnaskitojn en hospitalo. Post unu-jara edukado, inter ili la inteligenteca kvociento de 5 infanoj estas superaj, unu — elstara. Antaŭ nelonge li starigis infanĝardenon “Ora Lulilo” kaj fariĝis instruisto kun plej alta klereco de pedagogio. Pro sciivolemo mi vizitis ĝin.

Sur gazono doktoro Cheng Yue ludis kun infanoj “aglo kaj kokidoj”. Li ludis la rolon de aglo, kuris kaj ridis kun la “kokidoj”. Li diris, ke kune ludi estas grava parto de ĝojiga edukado. La ĝardeneska medio, kompleto da amuziloj, ĉiuflanka sistemo de televidmonitoro faris la lokon paradizo de infanoj. La diferenco inter ĝi kaj ordinaraj infanĝardenoj estas en tio, ke la ordinaraj nur flegas malpli-ol-3-jarajn infanojn, sed en la Ora Lulilo oni multe frugas la edukadon.

En leciono pri pentrado de “amin-da kateto” mi rimarkis, ke 8 infanoj pentras kateton ĉiu laŭ sia propra plaĉo: Iuj skizis diversajn katetojn, kolorigis ilin per diversaj koloroj.

Aliaj faris kateton rapide per peniko. Cheng Yue klarigis, ke la leciono celas ne nur altigi ilian kapablon de pentrado, sed ankaŭ havigi al ili kapablojn de pensado, strukturado kaj akordigo de manoj kaj okuloj. En “Ora Lulilo” estas 190 infanoj malpli-ol-5-jaraj. Ili lernas danci, naĝi, rulgliti, ludi violonon, reciti poemon k.a. Ĉiumonate ili partoprenas nivelan ekzamenon de ĉiuflankaj kapabloj. Kaj poste oni faras klerigan projekton por apartaj infanoj. Dank’ al tio la infanoj estas bone trejnitaj en sportado, konado, interkomunikado kaj artoj. La proporcio inter instruistoj kaj infanoj estas 1:1.7, tio ebligas la apartan edukadon. En “Ora Lulilo” ne mankas instruistoj diplomitiĝintaj el kolegio. Ili laboras tie por esplori sciencan metodon de frua edukado. Cheng Yue diris, ke antaŭ kelkaj jaroj ĉinoj jam informiĝis pri frua edukado, kies

metodoj tamen bezonas ripetadan provadon. Li diris, ke en lia praktiko la kapablo de iuj infanoj leviĝis tre rapide, kio mirigis eĉ lin mem: Iu 9-monata infano ne povis rampi, sed kiam ĝi 2-jariĝis, ĝi kapablis naĝi kaj eĉ legi post trejnado. Cheng Yue firme kredas, ke inteligenteco estas kulturata ĉefe post la naskiĝo.

Mi renkontis iun junan patri-non, kiu venis tien por viziti sian bebon. Ŝi diris al mi, ke ŝi kaj ŝia edzo laboras alilande, la infano estis enfermiĝema kaj plorema. Sed ĉi tie vivinte kelkajn monatojn, li fariĝis pli vigla. La pli-ol-unu-jara infano prezentis infankanton: “Ĝojega mi estas en infanĝardeno, instruisto similas al patrino...” Cheng Yue kontente diris: “Post frua edukado en ‘Ora Lulilo’, la inteligenteca kvociento de infano superas tiun de ordinaraj infanoj je 20%.” Li planas starigi ekologian ĝardenon en antaŭurbo de Pekino, por ke tie la infanoj kulturu arbojn, bredu bestetojn, ĉar tio alproksimigas ilin al la naturo. Li diris, ke tio, kion li faras, celas ne kulturi eksterordinarajn infanojn, sed esplori, kompletigi la planon por ke la ordinaraj infanoj de Ĉinio kresku kiel eble plej bone. ■



La psikologia doktoro (la dua de maldekstre) ludanta kun infanoj

Kian rolon ludas konfuceanismo en la moderna socio?



S-ro Kong Xianglin en la ĉin-lingva kurso de la Adelajda Mezlernejo

KONFUCEANISMO estas granda ideologia sistemo. Ĝi ampleksas filozofion, etikon, politikon, edukadon kc. La kerno de la sistemo estas homamo. Laŭ ekspliko de Konfuceo, la homoj kun perfekta virto devas “ami ĉiujn homojn”. Li opiniis ke oni devas prizorgi, ami, protekti, simpatii, kompreni, esti kaj fidi aliajn homojn. Laŭ la doktrino de Konfuceo la “homamo” estas ne nur fundamento de la administrado de la ŝtato, sed ankaŭ bazo de la homa memkulturo. Surbaze de tio, Konfuceo emfazis la socian pozicion de la homoj kaj alte taksis ilian rolon. Li la unua en Ĉinio interesiĝis pri la homa vivo kaj prenis la homojn kiel bazon de laboro kaj alte taksis ilian rolon en la socia transformado. La doktrino pri homoj kaj filozofio estis progresema siatempe. Ĝi havas pozitivan signifon ankaŭ en la moderna socio.

Konfuceanismo alte taksas la reguligadon de la sociaj interri-

latoj. Ĝi emfazas harmonion de la familio kaj harmonion inter la homoj, inter la gvidantoj kaj gvidatoj, inter la landoj, inter la homoj kaj naturo. La familio estas bazo de la socio, sekve ĝia harmonio akcelas la socian pacon. Konfuceo admonis, ke la socianoj estu honestaj kaj grandanimaj kaj ne trudu al aliaj tion, kion ili mem ne ŝatas. Li diris, ke la harmoniaj homaj interrilatoj faras la socion paca. Li admonis, ke la regantoj, rigardante la popolon kiel bazon de la ŝtato, oponu kontraŭ hegemoniismo kaj despotismo kaj praktiku humanan politikon. Li proponis produktadon, por ke la popolo havu sufiĉe da manĝaĵoj. Li diris: “Kiam la reganto dece kondutas, ĉio iras bone, eĉ se li ne donas ordonon. Sed kiam li ne dece kondutas, oni ne obeas lin, eĉ se li donas ordonon.” La regantoj devas juste trakti la popolon, esti honestaj kaj modestaj je elspezo, klerigi la popolon, por ke ĝi kresku kaj bon-

haviĝu. La regantoj devas elekti eminentajn kapablulojn inter la plebanoj por administri la ŝtaton. La popolo devas esti lojala al la ŝtato, diligente labori kaj konscience plenumi la aferojn. Oni devas fari ĉion ĉi por politika harmonio kaj socia stabilo. Oni devas per pacaj rimedoj solvi la konfliktojn inter landoj kaj nacioj. La perfekta virto kaj socia harmonio povas ludi pozitivan rolon en la moderna socio, ekzemple redukti familian disfalon, preventi egoisman dilatiĝon, reciproke trompon kaj tiranadon de fortuloj super malfortuloj, malpermesi koruptiĝon kaj malversacion, protekti la naturon.

Konfuceo tre akcentis la moralajn kaj memkulturon de la homoj. Lia idealo estis perfektigi sin kaj feliĉigi la popolon.

Konfuceo dediĉis grandan atenton al klerigado de la popolo. Li la unua fondis privatan lernejon kaj liberigis instruadon el la registara monopolo. Li proponis instrui ĉiujn homojn sendistinge. En sia longtempa instruado li akumulis riĉan sperton kaj elmetis sisteman teorion pri edukado. Li estas rigardata kiel eterna modelo de virto kaj lernado. Li praktikis instruadon kun la celo elkulturi eminentajn homojn kaj efektiviĝi sian politikan doktrinon pri humanismo. En la longtempa praktikado de instruado li ellaboris multajn efikajn instrumentojn, ekz. instrui lernantojn laŭ iliaj kapabloj, doni gvidon laŭgrade, relernigi nove akiritajn sciojn, kombini instruadon kun lernado, kombini lernadon kun pensado kaj konduto. Li alvokis, ke instruistoj lernu

(Daŭrigo sur p. 50)

Konfuceanismo kaj orienta ekonomio

Prof. Lee Chong-Yeong, prezidanto de UEA, faris prelegon "Ekonomiko de Konfuceo" en IKU kadre de la 82-a UK en Adelajdo. Kun lia konsento, ni publikigis sube parton de lia prelego.

La Red.

KONFUCEANISMO profunde influas ne nur Ĉinion, sed ankaŭ aliajn aziajn landojn kaj regionojn.

En Oriento la ĉefa komuna elemento estas tiel nomata "afekciismo", male de raciismo en Okcidento. La afekcia modelo havas tri elementojn:

Unue, humaneco estas la baza elemento de la afekcia modelo de ekonomia evoluo. En Oriento oni pli grave taksas humanecan rilaton inter homoj. Rilatoj inter homoj konsistas el tri devoj de homoj (lojaleco al reĝo aŭ ŝtato, fileco al gepatroj kaj obeeco al edzo) kaj kvin moralaj reguloj inter homoj (rilatoj inter patro kaj filo, reĝo kaj regato, edzo kaj edzino, maljunulo kaj junulo, kaj inter amikoj).

Pro tio, decido sub la konfucea etiko dependas ne nur de racia analizo kaj objektivaj ekonomia efikeco, sed ankaŭ de subjektivaj kaj humanecaj kriterioj kaj specifaj rilatoj inter malsamaj homoj.

Due, kolektivismo. En Oriento, aparteno al iu grupo havas gravan socian signifon, ĉar ofte oni mezuras individuon ne laŭ "kiu li/ŝi estas", sed laŭ "al kiu grupo li/ŝi apartenas". La baza grupo estas familio, sed la grupo ankaŭ povas esti samurbo, samregiono, aŭ samlando. Se oni ne apartenas al iu grupo, oni preskaŭ ne ekzistas.

El la grupoj familio estas la plej grava. Estas la devo de la famiestro protekti kaj zorgi la membrojn, kaj estas devo de la familianoj lojale obei la famiestron kaj kontribui al la bono de la familio.

La familiaj rilatoj aŭ rilatoj kun parencoj etendiĝas al ekonomia firmao, kaj komerca firmao dun-



La aŭtoro en prelego

gas aŭ estrigas familianojn. Estro de komerca aŭ industria firmao vole aŭ nevole dungas parencojn.

Tiuj, kiuj ne zorgas familianojn aŭ parencojn, estas socie neakcepteblaj. Pro tio, ofte oni devas decidi ne surbaze de racia analizo de la situacio nek nur por maksimuma efikeco, sed surbaze de afekcio kaj subjektiva taksado. Estro de komerca firmao ne tuj maldungas parencon en firmao, eĉ se li/ŝi faris eraron. Kompreneble, familianoj devas helpi interalie kiam iu familiano suferas de malfeliĉo.

La etendita koncepto de familio en firmao influas aŭ pozitive aŭ negative. En japana firmao la koncepto de la familio grandiĝis kaj akceptas neparencon kiel membron de la familio. Ĝi ofte havas pozitivan efikon en komerca firmao.

Kiam la koncepto de familio maksimume etendiĝas, ĝi egalas al samlandanoj aŭ ŝtato. Fakte, ĉina vorto por "ŝtato" litere signifas "ŝtatan familion". Pro tio, lojaleco al la ŝtato (reĝo) estas nedisputebla devo de ĝiaj "familianoj". Individuo devas adapti siajn rajtojn por la bono de la "ŝtata familio".

La koncepto de la "ŝtata familio" pozitive kontribuas al stabila registaro, aŭ negative kontribuas al la evoluo de demokratio en la formo de toleremo al diktatoreco.

Trie, konservativismo. Konservativisma nocio kontribuas al la tenado de tradicio kaj nerapida ŝanĝo. Tradicio kaj longdaŭra servo al la organizaĵo estas laŭditaj kaj oftaj ŝanĝoj estas abomenitaj. Konservativismo ankaŭ konsistas el "ĝusta mezo", aŭ meza vojo. La ĝusta mezo indikas harmonion kun ĉirkaŭaĵoj; harmonio inter homoj kaj naturo, kaj harmonia rilato inter homoj. Laŭ la konfucea instruo, homoj ne devas kontraŭstari naturon, sed devas harmonie sin akomodi al ĝi.

Kiel la afekcia modelo de ekonomia evoluo laŭ la konfucea etiko influas ekonomian evoluon kaj kreskadon de firmaoj?

1. Politika stabileco: Politika stabileco estas la plej grava kaj necesa kondiĉo por ekonomia evoluo en ekonomie evoluantaj landoj. Politika stabileco en iu lando estas atingebla pere de du manieroj: bone funkcia demokratia registaro aŭ forte patreca registaro.

La konfucea etiko instruas lojalecon al grupo kaj respekton kaj lojalecon al la estro de la grupo. Konfuceanismo instruas absolutan lojalecon al patro, majstro kaj reĝo. La reĝo en la moderna mondo signifas registaron. Tiu koncepto kontribuis al la politika stabilo de registaroj en orient-aziaj landoj.

Kompreneble, tro forte patreca registaro foje povas esti aŭtoritata kaj diktatora. Por la bono de ekonomia evoluo, malriĉaj popoloj povas esti toleremaj al aŭtoritata registaro ĝis la ekonomio atingas iun nivelon de disvolviĝo. Ŝajnas ke multaj aziaj landoj preferis ekonomian evoluon sub politika stabileco, aŭ eĉ sub aŭtoritata registaro, kontraŭ

ekonomia stagneco sub politika nestabileco.

2. Humaneca organizaĵo: Familiismo, kolektivismo kaj lojaleco al grupo influis humanecan dimension de ekonomio.

Laŭ la afekcia modelo de ekonomia evoluo en Orienta Azio, kiu emfazas humanecon, kolektivismon kaj konservativismon, ekonomia entrepreno estas ne nur ekonomia sed ankaŭ socia estaĵo. Pro tio, entrepreno estas de humaneca sistemo por atingi antaŭe difinitan celon pere de ĝusta kombinaĵo de laboristoj, administristoj kaj patronoj. Sub tia nocio, homoj estas ne kostoj sed la plej grava havaĵo de la firmao, kaj la rilato inter dunginto kaj dunginto estas patreca rilato en familio sen antaŭe fiksita kontraktperiodo. La koncepto de "dumviva dungado" devenas de tiu rilato.

En modernaj entreprenoj, sciado estas pli grava kaj pli valora havaĵo ol fizika havaĵo. En tia senco, la nocio de humaneca organizaĵo estas pli taŭga por modernaj firmaoj kaj ekonomia evoluo.

La humaneca nocio ankaŭ havas malavantaĝon. Ofte ĝi kaŭzas malefikecon, neracian decidon, nepotismon, aŭ regionismon. Superaj postenoj en komercaj firmaoj normale estas okupataj de parencoj. Tio foje malhelpas kreskadon de komercaj kaj ekonomiaj firmaoj. Pro tio, malgrandaj firmaoj troviĝas ĉefe en Taiwan. En Japanio, la nocio de familio estas pli granda kaj principe ekster parencoj ankaŭ povas esti membroj de "iemoto", etendita familio. Tio kontribuis al la disvolviĝo de grandaj firmaoj en Japanio. En Korea Respubliko, la patreca registaro intence kreis grandajn firmaojn, unuiginte mezgrandajn firmaojn, por eviti malavantaĝon de malgrandaj firmaoj.

3. Edukado: Konfuceanismo forte emfazas edukadon kaj lernadon. Estas devo de gepatroj sin oferi por eduki kaj lernigi siajn infanojn.

Socia hierarkio estis tia, ke la intelektulo estas konsiderita je la pinto kaj la komercisto estas je la plej malalta loko: Intelektulo-Terkulturisto-Metiisto-Komercisto.

Ĉiuj konkuras por atingi la nivelon de la intelektularo. Edukado estas nepre necesa por atingi la nivelon de intelektulo. Kaj ankaŭ por la bono de la nomo de la familio, oni devas eduki sin mem por ne malpurigi la familian nomon.

En la moderna ekonomia mondo de altnivela teknologio kaj elektroniko, kie homforto fariĝas la plej valora havaĵo de ekonomiaj firmaoj, la fervoro por edukado forte kontribuas al ekonomia evoluo. Tamen la fervoro por edukado, por prestiĝo kaj por akiri altrangajn postenojn montras ĝian socie negativan aspekton.

De la supre menciitaj partoj ni vidas ke konfuceanismo ludas gravan rolon en moderna ekonomia vivo. ■

Listo de libroj ricevitaj de *El Popola Ĉinio* kaj Ĉina Esperanto-Biblioteko (II)



Kamengrada balado Georgi Dikovski. Kontrast (Bulgario), 1994. 56 p. 20.50 cm. Originale verkitaj poemoj en Esperanto. Donacis Georgi Dikovski.

Gemverkoj de Higuĉi Iĉijou Trad. Otsuka Eizo el la japana. Ekscitono Esperanta (Japanio), 1997. 110 p. 21 cm. Ilus. 4 mallongaj romanoj de la talenta japana poezia verkistino Higuĉi Iĉijou. Mendebla ĉe Japana Esperanto-Instituto kaj Japana Esperanta Librokooperativo. Donacis Otsuka Eizo.

Nomoj de acidoj en Internacia Lingvo Ilo Jan Waclaw Pioro. Milanowek (Pollando), 1996 (3-a eld.). 34 p. 21 cm. Donacis Jan Waclaw Pioro.

Kiu malkovris oksigenion? Jan Waclaw Pioro. Milanowek, 1996 (3-a eld.). 10 p. 21 cm. Donacis Jan Waclaw Pioro.

Kemia internacia vortaro Komp. Jan Waclaw Pioro. Piastow (Pollando), 1997 (4-a eld.). 74 p. 21 cm. Donacis Jan Waclaw Pioro.

Historio pri nomigo de kemiaj elementoj en Esperanto Jan Waclaw Pioro. Piastow, 1996 (2-a eld.). 10 p. 21 cm. Donacis Jan Waclaw Pioro.

Logiko en kemia nomenklaturado Jan Waclaw Pioro, Piastow, 1997 (2-a eld.) 32 p. 21 cm. Donacis Jan Waclaw Pioro.

Bildo de la mondo Julia Pioro. Piastow, 1997 (7-a eld.) 50 p. 21 cm. 20 poemoj en la germana, pola kaj Esperanto. Donacis Jan Waclaw Pioro.

Hanaoka Seiŝu Trad. Egawa Harukuni kaj aliaj. Wakayama (Japanio), 1997. 32 p. 25.50 cm. Ilus. En la japana, ĉina, angla kaj Esperanto. Pri Hanaoka Seiŝu, japana kuracisto, kiu uzis ĝeneralan anestezaĵon antaŭ preskaŭ 200 jaroj. Mendebla ĉe Egawa Harukuni. Donacis Egawa Harukuni.

Elĉerpaĵoj el la irlandlingva literaturo Komp. Liam O Cuirc. Trad. Liam O Cuirc kaj aliaj. Esperanto-Asocio de Irlando, 1996. 28 p. 21 cm. En la gaela kaj Esperanto. 12 rakontoj, kiuj ebligas iom trarigardi la ampleksan irlandlingvan literaturon. Donacis Liam O Cuirc.

Mallonga historio de la Esperanto-movado en Irlando Liam O Cuirc. Esperanto-Asocio de Irlando, 1996. 32 p. 21 cm. Donacis Liam O Cuirc.

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

Kunvenis ĝeneralaj sekretarioj

Inter la 11-a kaj 14-a de decembro de 1997, en Conghua de Guangdong-provinco en suda Ĉinio, okazis la Kvara Kunveno de Ĝeneralaj Sekretarioj de Provincaj Esperanto-Asocioj de Ĉinio. En la kunveno partoprenis 39 gesamideanoj el la tuta Ĉinio. S-ino Tan Xiuzhu, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, gvidis la kunvenon. S-ro Dai Song'en, ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, resumis la aktivadon de ĉinaj esperantistoj kaj Esperantaj organizaĵoj en la pasintaj jaroj kaj prezentis planojn de laboro por la venontaj jaroj.

La partoprenintoj interŝanĝis opiniojn kaj spertojn en la Esperanta movado kaj montris memfidon por plivigli la movadon en siaj lokoj. Ĉar kolektiĝis multaj aktivuloj, oni kaptis la ŝancon por okazigi multajn aliajn kunvenojn, ekz. la jarkunvenoj de la Ĉina Medicina Esperanto-Asocio kaj la Ĉina Fervoja Esperanto-Asocio. Dume fondiĝis la Guangdong-a Junulara Esperanto-Asocio. Preparantoj de la Sesa Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto raportis pri la prepara laboro.

MAO ZIFU*:

Filozofio kaj realo (Poemoj)



La aŭtoro

Pordo

nenio estas pordo.
tra ĝi povas pasi ĉio
forma aŭ senforma.
kaj kia poz' ne gravas —
stara aŭ rampa.
pordo estas ĉio.
nenio trans ĝin povas pasi,
nek forma nek senforma.
pordoj simbolo nuras
sur solida muro.
eĉ tiel, ĉiam kun seruro.
sen seruro pordoj
estas fenestroj.

Akvo kaj aero

nebulo
el akvo
drivas tra sur aero.
nuboj
de akveroj
super aero flosas.
aero ventiĝas.
akvoj sin interbatalas
per sango kaj larmoj de aero.
akvoj sub aero
fluas infre inferen.
aero estas aero.

Aritmetiko

se ne estus la serpento.
se ne la arbo.
se unu ne iĝus du.
gravito el du.
du en gravito.
du unuiĝemas.
se ne estus unu,
la du ne troviĝus.
se la du sin disigas,
la unu nulas.
aritmetikon la infanan
ne komprenas plenkreskuloj.

Krepuske

krepuske
ĉe fenestro
inter pozitiv' kaj negativo
nulo pulsas tra fluidoj.
montaro elmergiĝas.
folioj sinetende
aŭ male estas sub okuloj.
vivo kaj morto
laŭas sur eterno.
flugaj naĝaj
rampaj kurajj...
en mia buŝo
kaj mi el en tero
uf

Por kio

frukto for de arbo
por manĝati.
fiŝo el akvo
por pecigati.
vi for de mi
por kio?
la manoj apenaŭ premitaj
disas palpebrume.
semo for de trunko
por nova vivo.
fiŝo el akvo
por eviti sufokiĝon.
vi
for
de
mi
por kio?
hardi niajn plumojn!?

*La aŭtoro naskiĝis en 1963 en Hunan-provinco de Ĉinio kaj instruistiĝis en 1984. Paralizinte pro trafika akcidento en 1985, li komencis lerni Esperanton. En la pasintaj jaroj li publikigis serion da Esperantaj poemoj kaj noveloj. En 1995 li gajnis la premion "Nova Talento" en la beletra konkurso okazigita de UEA. Nia revuo raportis pri li en la 2-a numero, 1996.

ĈINIO

● La 4-an de novembro 1997, la Ĉina Verkista Asocio okazigis en Pekino la Simpozion Memore al la 65-a Datreveno de Literatura Verkado de Chun-Chan Yeh. Dekoj da literaturistoj kaj tradukistoj partoprenis ĝin kaj alte taksis la sukcesojn de veterana esperantisto Chun-Chan Yeh dum la pasintaj 65 jaroj kaj lian kontribuon al la



Respondeculoj de la Ĉina E-Ligo kaj la redakcio de EPC donacas bukedon al s-ro Chun Chan-Yeh.

ĉina moderna literaturo. Kiel literaturisto, Yeh verkis novelojn, prozaĵojn kaj porinfanajn literaturaĵojn de pli ol 8 milionoj da ĉinaj ideogramoj, kies parto estis tradukita en pli ol 20 lingvojn. Liaj ĉinlingvaj tradukoj havas ĉ. 4 milionojn da ideogramoj. Pro sia ĉinigo de fabeloj de Andersen, li ricevis Naciflagan Ordenon de Danio. En sia juneco Yeh verkis kelkajn literaturaĵojn en Esperanto kaj la angla lingvo.

BELGIO

● Kvindeko da parolantoj de la internacia lingvo el Belgio, Germanio kaj Nederlando venis al Lieĝo, la 28-an de septembro 1997, precipe por "esplori" la historion de tiu urbego en orienta Valonio (suda Belgio). Ĉion ĉi la Esperanto-klubo de Lieĝo resumis en unuhora videobendo, kun internaci-lingvaj klarigoj. La ĉeestantoj havis okazon admiri la kvietajn kaj kaŝitajn romantikajn kortojn, malnovajn konstruaĵojn, la riĉajn endomajn dekoraciojn kaj meblarojn, la muzeojn ktp. En la antaŭtagmezo okazis ankaŭ ĝenerala asembleo de la organizinta asocio Senlime, dum kiu estis faritaj du interesaj decidoj: Unue, la sekvanta Trilanda Renkontiĝo okazos iomete eksterregione, en Dinant (Belgio), kaj ĝi estos dutaga (27. kaj 28. 06 1998); due, la asocia komitato

klopodos reaktivigi la iaman Esperanto-kunvenejon "Select" en Kelmis, la centro de la iama neŭtrala Moresnet, kie oni revis, antaŭ preskaŭ 100 jaroj, krei la Esperanto-ŝtaton "Amikejo". (Uwe Joachim Moritz)

NEPALO

● Esperanto-Domo (ED) estas nova koncepto en la Esperanto-movado de Nepalo. Ĝin oni kreis antaŭ nelonge kun celo antaŭenigi la movadon de Esperanto kaj helpi tiujn, kiuj serĉas vojon al Esperanto. Jen ni enkondukas nian projekton de "Esperanto-Domo" al vi koncize: 1. Instruado: ED celas instrui Esperanton je diversaj niveloj kaj metodoj; 2. Korespondo-servo: Ĉar ne estas facile por nepalanoj vojaĝi eksterlanden kaj renkonti geesperantistojn tie, estas bona ideo ke gelernantoj tie ĉi pensu pri korespondado al la tuta mondo; 3. Gastigo-servo: ED celas helpi gastojn esperantistajn per multaj aferoj; 4. Turismo-servo: ED celas helpi al vizitantoj kaj jam vizitantoj turistoj esperantistaj; 5. Eldonado: ED celas eldoni diversajn librojn kaj bultenojn. Adr.: P. O. Box 3447 Kathmandu. Nepal. (Esperanto-Domo)

USONO

● La Kvara Aŭtuna Renkontiĝo Esperantista en Ludlow, Vermonto (Usono) realiĝis la 11-13-an de oktobro 1997. Kuniĝis ĉe la komforta montara feriejo Okemo diversaĝa grupo de pli ol 70 homoj el kvin landoj. Krom prelegoj, kursetoj, librovendado, promenoj, ludoj, muzikado kaj aliaj plezuraĵoj okazis ankaŭ riĉa kultura vespero, kiu alportis i.a. lumbildajn programojn, literaturan omaĝon al E. Privat, originalan teatraĵon kaj tutgrupan kant-plantadon de napoj. La tuta aranĝo impresis tre granda, vigla kaj diversa kun multaj infanoj, bonegaj parolantoj kaj seriozaj interesitoj. OKEMO 98 okazos samloke la 10-12-an de oktobro. (Bill Maxey)

DANIO

● Inter la 9-a kaj 22-a de aŭgusto 1998 okazos du Esperanto-semajnoj en Klint de Danio. Dum la semajnoj Atilio Rojas el Argentino, Aleksander Kogan el Rusio kaj Joel Brozovsky el Japanio instruos Esperanton per Cseh-metodo kaj Ole Therkelsen prelegos pri la kosmologio de Martinus. Oni povos ĉeesti unu aŭ du semajnojn laŭplaĉe. Interesatoj bonvolu kontakti Martinus-Instituton, Mariendalsvej 96, 2000 Frederiksberg, Danio.

Alko kaj gasmasko

VENDISTO famis pro sia talento por vendado. Li vendis dentobroson al dentisto, panon al panisto kaj televidilon al blindulo. Lia amiko diris al li: “Se vi vendos gasmaskon al alko, vi estos elstara vendisto.”

La vendisto do venis al norda arbaro, kie loĝis multaj alkoj. “Saluton!” li salutis iun alkon. “Vi certe bezonas gasmaskon.”

“Ĉi tie regas freŝa aero, por kio mi bezonas ĝin!” diris la alko.

“Nun ĉiu uzas ĝin.”

“Sed, bedaŭrinde, mi ne bezonas ĝin.”

“Momenton,” diris la vendisto, “vi certe bezonos.” Tion dirinte, li ekkonstruis fabrikon en la centro de la arbaro.

“Vi frenezas!” diris lia amiko.

“Ne, mi nur volas vendi gasmaskon al alko.”

Post la finkonstruiĝo de la fabriko multe da venena gaso elflugis el la fumtubo. Post nelonge la alko vizitis la vendiston kaj diris: “Vendu al mi gasmaskon.”

“Tion mi atendas,” dirante li vendis ĝin al la alko.

“Ankaŭ aliaj alkoj deziras havi, ĉu vi havas pli da ili?”

“Vi ja havas bonŝancon, mi havas sufiĉe multe.”

“Kion via fabriko produktas?” scivole demandis la alko.

“Gasmaskojn,” ĝoje respondis la vendisto. ■



NOVA ELTROVO DE ŜTONKAVERNOJ

Teksto kaj fotoj de HUO WEI



ALI-ALTEBENAĴO 4 400 metrojn super la marnivelo sterniĝas en okcidenta Tibeto. Ĝi konsistigas trionon de la totala areo de Tibeto. En Ali, sur ĉiu kvadrata kilometro loĝas meznombre nur 0.16 homo, tie kuŝas mil kilometroj da “senhoma dezerto”. Sekve Ali fariĝis la plej magneta loko sur la mistera Tibeta Altebenaĵo.

Ali estas alloga pro siaj amasoj da malfacile solveblaj enigmoj, el kiuj unu estas Guge-regno. Laŭ historia libro en la tibeta lingvo 16 reĝoj sinsekve regis Guge-regnon kaj ĝi disfalis en la 17-a jc. La problemo, kiu plej interesis la arkeologojn, estas: La regno kun centmil loĝantoj prosperis siatempe, tamen la trovita ruino de ĝia ĉefurbo kaj ĉiuj loĝeblaj ka-

vernoj povis enteni nur ĉ. 2 000 homojn. Ĉu estas ankaŭ aliaj ruiniĝintaj kasteloj, kiuj kaŝiĝas en la profunda dezerto?

Sekve ekspedicioj iris sur Ali-altebenaĵon unu post alia por esplori la misteran regnon. Antaŭ 5 jaroj mi feliĉe aniĝis al esplora taĉmento el tibetaj kaj han-aj arkeologoj. La taĉmento plurfoje iris en profundajn montojn kaj valojn de Ali kaj fine atingis gravan arkeologian trovon.


Posttagmeze de iu tago, fininte la taskon, ni revenis per ĵipo. Survoje dekkelk-jara tibeta paŝtistino petis veturi per nia ĵipo. En la ĵipo ni demandis ŝin, ĉu estas kaverno kun freskoj. Ŝi respondis, ke foje ŝi kun sia ŝafaro eniris kaverton sur la proksima montodeklivo malantaŭ Dongga-vilaĝo por sin ŝirmi kontraŭ pluvo

kaj tie ŝi vidis tre belan freskon.

Ni petis ŝin konduki nin al la vilaĝo Dongga. Ni vidis pli ol dek kavernojn, kiuj dislokiĝas sur U-forma krutaĵo proksime de la vilaĝo. Poste en Piyang-vilaĝo forde de Dongga je 2 kilometroj, ni denove trovis multajn kavernojn kun freskaj restaĵoj. Ni nomas la nove trovitan misteran regnon “kavernara ruino de Dongga kaj Piyang”.

Post kelkjara ordigado kaj studado arkeologoj venis al la konkludo, ke ĝi estas la plej granda budaisma kaverna ruino el tiuspecaj kavernoj ĝis nun trovitaj en Tibeto. Laŭ nekompleta statistiko tie troviĝas proksimume mil kavernoj, kiuj plejparte servas kiel loĝejoj, meditejoj kaj tenejoj por bonzoj, parte por statuoj kaj freskoj kaj preĝejoj. La

EN ALI



kavernoj estas unu-, du-, tri- kaj plurĉambraj kun diversaj tegmentoj.

Ĉar la kavernoj estis fositaj sur malkompakta sabloroka montdeklivo, tial en ili estis neeble ĉizi ŝtonojn por statuoj. Oni povis nur ŝmiri la murojn per tavolo da argilo miksitaj kun pajlo kaj poste kalki ilin. Oni faris sur la muroj freskojn kaj statuojn. La similaĵoj videblas ankaŭ en Dunhuang kaj Xinjiang en okcidenta Ĉinio.

La tieaj freskoj plejparte estis faritaj per lokaj mineralaj farboj. Malgraŭ atako de sablovento en multaj jaroj, ili ne senkoloriĝis. Ili temas pri budhoj, bodisatvo, bikŝuoj, flugaj apsaraso, kultado, mandaloj kaj religia ceremonio, kaj estas ankaŭ diversaj ornamaj desegnaĵoj. I.a. la

freskoj en la kavernoj n-roj 1 kaj 2 en Dongga A kaj la kavernoj n-ro 1 en Dongga B estas la plej ĉarmaj. Tiuj kavernoj estas kvadrataj kun tegmentoj ebena, en formo de inversigita funelo aŭ plurtavola samcentr-cirkla. La kavernoj n-ro 1 en Dongga A, 6.65 m profunda kaj larĝa respektive kaj 5.65 m alta de la kasono ĝis la fundo, estas la plej granda. La kavernoj estas plene kovritaj de freskoj diversstaj: La supro kovriĝas per 9-tavolaj desegnaĵoj, el kiuj la plej okulfrapaj estas bildoj de kvin cervoj, ok feniksoj, kvar drakoj, paro da kokoj starantaj vizaĝo al vizaĝo, tigro pelanta tri ŝafojn, paro da anseroj starantaj vizaĝo al vizaĝo, kaj bildoj de diverspozaj, viglaj bestoj kaj tiuj de diverspozaj dancistinoj kaj muzikistoj. Meze de la muroj estas pentritaj diversaj mandaloj, laŭ situo de la Budho kaj liaj servistoj ili plejparte estis vajradhatu-aj mandaloj. Malsupre de la mandalaj bildoj estas pentraĵoj pri la Budho predikanta sutron, subigo de demono, elefanta batalo, unua kaj refoja turnado de preĝado, nirvano de la Budho, konstruo de stupao ktp.

En la kavernoj n-ro 2 de Dongga-vilaĝo vidiĝas freskoj de milbudhaj bildoj kun mandala supro. En la randoj estas pentraĵoj de multvizaĝaj kaj multbrakaj dioj, iuj el ili kun besta kapo. Historia ben-religia libro de Tibeto notas, ke dioj de ben-religio estas ĉevalkapa, tigrokapa, kaprokapa, ĉiuj kun homa korpo. Ali estas unu el la luliloj de la frua ben-religio. Kredeble tiuj bildoj spegulas la diojn kaj spiritojn de ben-religio.


En la kavernoj n-ro 1, Dongga B, oni trovis tibetlingvajn epigrafojn, kiuj plejparte defalis, nun legeblas nur apartaj vortoj, kiel ekz. nomoj de la loko kaj kavernoj, majstroj koncernaj al la konstruado k.a. Malgraŭ tio, tiuj valoraj antikvaj restaĵoj liveris ates-

tojn por ni solvi la problemojn pri la konstrua tempo de la kavernoj, koncernaj religiaj personoj kaj aliaj.

Eltrovo de la ŝtonkavernaro de Dongga kaj Piyang ne nur pleniĝis gravan blankon de la antikva ŝtonkaverna arto de okcidenta Tibeto, sed pli grave malkovris la lokon okupatan de la okcidenta parto de Tibeto en la antikva civilizacio de Azio.

La arkeologia esplorado montras, ke budaj kavernaj freskoj en la okcidenta parto de Tibeto vidiĝas ne nur en Dongga kaj Piyang, sed ankaŭ en aliaj lokoj de la vasta Ali-altebenaĵo kun Guge-regno kiel la centro. Geografie Ali situas en la nodo de la regionoj, kie furoris Mez-Azia kaj Sud-Azia budajismo. Laŭ la maniero, stilo, trajtoj de la homaj bestfiguroj kaj aliaj flankoj de la freskoj en la kavernaro de Dongga kaj Piyang, oni trovis tre intiman rilaton inter ili kaj la budajismo de Mez-Azio kaj Sud-Azio. Ekz. en la freskoj la birdoparoj, bestoparoj kaj la ornamaĵoj prezentis unu el la trajtoj de la antikva persa arto de Mez-Azio. La longaj roboj kun triangula borderita kolumo en la freskoj estis ordinaraj ankaŭ en la kavernoj de Dunhuang, regata de Tubo-regno. Tio montras kulturan rilaton inter ili. Tial, la kaverna arto de okcidenta Tibeto montras, ke ĝi iaparte estis enkondukita de Sud-Azio kaj havis rektan rilaton kun la religia arto de la sekreta sekto de Hindio, kaj tre kredeble ĝi ĉerpis certan arton de tiuj budajismoj de Mez-Azio.

De eltrovo de la kavernaro de Dongga kaj Piyang ĝis nun tibetaj kaj han-aj arkeologoj, historiistoj kaj tibetaj lingvistoj faris esploron pri la formoj de la kavernoj, enhavo de la freskoj, epigrafoj, ingrediencoj de la farboj, referencante antikvaj literaturojn, ili esperas, ke venos la tago, kiam malkovriĝos la mistera vualo de la kaverna arto de Ali. ■





1	3
2	4 5

- 1 Plafono de kaverno
- 2 Kapoj de budhostatuoj malkovritaj en la kaverna ruino
- 3 Atleto
- 4 Intervolvitaj drakoj
- 5 Kultataj statuoj de Guge-regno



HU YUN:



Vojaĝu al ĉinaj turismaj urboj kaj vilaĝoj en 1998

ANTAŬVESPERE de la nova jaro, multaj venas al Hanshan-templo por aŭskulti la noktan sonoradon de sonorilo. Komence la templon vizitas nur lokanoj kaj loĝantoj de la najbaraj provincoj. Poste turistoj el Sudorienta Azio, eĉ el Eŭropo kaj Ameriko, venas ĝui la vidindaĵon.

Hanshan-templo situas ĉe la urbo Suzhou (antikve Gusu), suda Ĉinio. Ĝi estas negranda, tamen tre fama pro la poemo de Tang-dinastio (618-907) — “Noktmeza albordiĝo al Acero-ponto”:
*Korva grako dum luna subiro
 prujna-nokte resonas,
 Fiŝŝip-lumo kaj bordaj aceroj
 sombran sonĝon dekoras.
 Hanshan-templo sin trovas
 ekster la urbo Gusu de longe,
 Sonorado noktmeza atingon
 mia-ŝipan ekmontras.*

La poeto priskribis nokton en akvolando de suda Ĉinio kaj ankaŭ esprimis sian ĉagrenon en vagado. Li tute ne antaŭvidis, ke post pli ol dumil jaroj lia poemo allogos tiel multe da turistoj al la templo. Je la jarfino de 1997, Hanshan-templo superabundis je

vizitantoj. Sed kiam proksimiĝis la jarŝanĝo, ĉiuj silente atendis la ekscitan momenton. En la sonorado komenciĝis nova turisma jaro.

Per kio regalos la turistojn en 1998 la ĉina turisma servo? Akompanate de la sonorado en Hanshan-templo, venas informo: la temo de la nova turisma jaro estas “Vojaĝu al ĉinaj turismaj urboj kaj vilaĝoj en 1998”. Krom la 16 itineroj prezentitaj en 1997, oni ĝuos ankaŭ du novajn programojn: “Nova aspekto de antikva urbo” kaj “Vilaĝa turismo”. La unua prezentos historiajn kaj kulturajn urbojn kun multaj vidindaĵoj malnovaj kaj novaj; la dua havas kvar partojn: pitoreskaj montoj kaj riveroj, vilaĝa etoso, nova aspekto de kamparo, diversaj okupoj de kamparanoj. Krome, en 1997 okazis 48 turismaj festoj kaj festivaloj en diversaj lokoj de Ĉinio, kaj en 1998 oni klopodas por pligajigi 23 el ili.

Ekde 1992, ĉiu turisma jaro en Ĉinio havas temon, ekz. “Vizitu Ĉinion ’92” kaj “Ĝuu montojn kaj riverojn ’93”. La temoj celas prezenti vidindaĵojn kaj allogi pli

multajn vizitantojn al Ĉinio. La turistoj ĝuis multajn novajn turismajn programojn en tiuj jaroj kaj la turisma afero en Ĉinio evoluas kaj iĝas pli kaj pli perfekta. De januaro ĝis aŭgusto de 1997, venis al Ĉinio ĉ. 37 milionoj da vizitantoj, je 9.24% pli multe ol en la sama periodo de 1996.

Ĉinio estas lando kun longa historio. La Imperiestra Palaco en Pekino, la Terakota Legio en la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio en Xi’an kaj aliaj historiaj restaĵoj allogas multajn turistojn al Ĉinio. La temo de 1996 “Ĉinio — nova feriejo” lanĉis novan turisman programon: partopreni en loka vivo. Urbanoj kun granda intereso ĝuas freŝan aeron en vilaĝoj kaj manĝas ĵus rikoltitan rizon kune kun kamparanoj. Ekde tiam, multaj fruktaj kaj legomaj ĝardenoj bonvenigas la urbanojn per la programo “libera plukado”. La turismaj servoj de Ĉinio vidis la altiran forton de tia programo, do en 1998 la turistoj ne nur ĝuos la antikvan ĉinan civilizacion, sed ankaŭ spertos la modernan vivon de ĉinaj urboj kaj vilaĝoj. ■

En urbeto de ledaĵoj

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de LI CHUNGENG

XINJI de Hebei-provinco estas fama urbeto de ledaĵoj en Ĉinio. Tie funkcias 8 000 entreprenoj pri tanado kaj pri farado kaj vendo de ledaĵoj, kiuj produktas 1.5 milionojn da peltaĵoj jare.

Profitante de fel-prilaborado, Xinji sin riĉigis kaj ne plu estas simpla urbeto. Tie staras altaj domoj, ambaŭflanke de la stratoj viciĝas grandaj kaj malgrandaj butikoj kaj budoj de diversaj ledaĵoj, kiaj vestoj, gantoj, kofroj kaj ŝuoj.

En la urbeto estas granda bazaro de ledaĵoj, kiu ampleksas multajn fakojn de leda industrio, inkl. de scienc-teknikaj informejoj, bankoj, restoracioj, amuzejoj ktp. Tiujn lokojn frekventas klien-

toj. Vendistoj senĉese krias kun rideto: "Rigardu la bonkvalitajn ledaĵojn. Provu kaj aĉetu!"

Se vi proksimiĝas al iu ajn budo, la mastro eble ne volas liberigi vin sen via aĉeto. Do, okazas ofte marĉando inter la aĉetanto kaj vendanto. Aĉetantoj ĉiam postulas, ke la vendanto malaltigu la prezon kiel eble plej multe. Kiam la aĉetanto pretas foriri sen aĉeti, ofte aŭdiĝas la voĉo de vendanto: "Nu, prenu. Ho, mi malprofitas."

Jam en la historio Xinji estis prilaborejo kaj komercejo de peltaĵoj en norda Ĉinio. Tiam la instalaĵoj por tani felon estis tre simplaj kaj multaj familioj faris nur ŝaffelajn surtutojn, matracojn k.a. La fel-prilaborejoj ofte malbonodoris, tial oni nomis la fel-prilaborantojn malbonodoraj tanistoj. Ili manĝis ekskluzive vaporumitajn farunaĵojn sorgajn aŭ maizajn kaj mem faritajn peklaĵojn. Nun la malnova kaj mallarĝa strato, kadukaj pordoj de la prilaborejoj ankoraŭ rememorigas pri la malfacilaj jaroj de la felistoj.

Dank' al la ekonomia disvolviĝo komence de la 80-aj jaroj, la tiea leda industrio multe evoluis. Oni importis avangardajn maŝinojn kaj teknikojn de tanado. Renovigo de ekipaĵoj kaj apliko de avangarda tekniko variigis kaj delikatisis produktaĵojn, kiuj vendiĝas ne nur en multaj lokoj de Ĉinio, sed ankaŭ en aliaj landoj.

Nun fel-prilaboron faras ne nur la tieaj loĝantoj, sed ankaŭ alilokanoj. Iuj privataj entreprenoj ĉiu kun la jara vendovaloro de 100 milionoj da juanoj dungis multe da laboristoj. Tiaj entreprenoj plejparte vendas en la malsupra etaĝo kaj produktas en la supra. La urbeto registaro bone faras administradon kaj servadon. Por kulturaj fakajn laborantojn kaj levi kvaliton de la varoj, ĝi fondis lernejon de fasonado kaj tajlorado, instituton de ledaj vestoj kaj sendis fabrikestrojn kaj led-teknikistojn viziti aliajn landojn kaj lerni alilande. Ankaŭ al medi-protektado ĝi dediĉas grandan atenton. Kolektinte monon de fabrikoj, ĝi konstruigis 3 poluci-imunajn kvartalojn de fel-prilaborado. La urbetoj bone komprenas, ke por sin riĉigi per leda industrio, oni neniel devas polucii la medion. ■



En vendejo de ledaj ĉapoj kaj kolumoj



- 1 En vendejo de ledaj vestoj
- 2 En laborejo de ledaj vestoj
- 3 Produktolinio por tinkturi ledon
- 4 Aĉeto
- 5 Strato en Xinji, kun reklamoj de ledaĵoj

1	4
2	
3	5





Buterteo oleteo kaj laktoteo

de CHEN NAN

Ofte mi legis/aŭdis pri buterpano, sed buterteo restas ne klara ideo... Kiam mankas motivo por tekstoj, mi petas specife priskribi vialandan buterteon.

GEORGO OTTO VASKE (Brazilo)

KIEL hejmlando de teo, Ĉinio havas multspecajn teojn kaj teaĵojn. Kaj ĉi-
noj alte taksas tetrinkadon kaj ties morojn. Kiel ĉiutagaj trinkaĵoj, buterteo, oleteo kaj laktoteo estas vaste ŝatataj de nacimalplimul-
toj de Ĉinio kaj intime rilatas kun iliaj vivmanieroj.

En Tibeto kaj Interna Mongolio oni trinkas ĉefe buterteon, precipe por la tibetanoj butero estas nemankigebla manĝaĵo. Antaŭe la tieaj paŝtistoj ekstraktis buteron el lakto de bovino aŭ ŝafino. Unue ili varmigis lakton, poste enverŝis ĝin en grandan sitelon kaj forte kirlis ĝin centojn da fojoj ĝis graso disiĝis de lakto. Fine ili ĉerpis helflavan grason kaj enverŝis la grason en ledsakon. Post malvarmigo butero es-

tis preta. Nun pli kaj pli multaj paŝtistoj faras tion per maŝino.

La tibetanoj ŝatas trinki buterteon. Por prepari buterteon oni unue infuzas teon aŭ tebrikon kaj kuiras ĝin, ĝis ĝi fariĝos densa suko. Ĝin verŝinte en specialan tesitelon kaj aldoninte al ĝi buteron kaj salon, oni forte tiras kaj retiras dekojn da fojoj korkon en la sitelo, ĝis butero kaj teo plene kunfandiĝos. Poste, oni enverŝas tiun likvaĵon en poton por ĝin varmigi. Jen la bongusta buterteo estas preta. Buterteo utilas al delikatigo de la haŭto, helpas rezisti kontraŭ frosto. Ĝi estas vaste ŝatata de tiuj, kiuj vivas sur altebenaĵo kun seka klimato.

Kompare kun tibetanoj, mongoloj preparas buterteon pli simple: boligi akvon en kupra kuiri-

lo, pulvorigi teon, ŝuti ĝin en bolantan akvon kaj aldoni al ĝi iom da salo, konvenan kvanton da freŝa lakto bovina aŭ ŝafina, ĝis ruĝa teo fariĝos lakto-blanka. Jen pretiĝas laktoteo. Poste, ili aldonas al ĝi iom da butero kaj bruna sukero. Jen estas preparita buterteo, ofte por solena ceremonio.

Oleteo furoras en la regionoj de la nacimalplimul-
toj de Guangxi, Guizhou kaj aliaj lokoj en suda Ĉinio. En tiuj lokoj la klimato estas kompare humida kaj en ties montregionoj iom malvarma. Oleteo estas utila al forigo de malsekeco en la korpo. Pro tio, la tieaj loĝantoj kutimas trinki oleteon ĉiutage. Donante grandan atenton al ĝiaj ingrediencoj, oni rostas miksitaĵon kaj rizon, kuiras ilin en akvo, per speciala ĉerpilo elakvigas la rekrementon kaj aldonas al la likvaĵo rostitajn gluec-rizon, sojfabojn, arakidsemojn, malgrasan viandon, porkan hepaton, fiŝfraĵojn, fiŝetojn kaj salikoketojn.

En la Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono, norda Ĉinio, oleteo kaj teo fakte preskaŭ havas nenion komunan, tamen oni tiel nomas oleteon, ĉar oni trinkas ĝin en maniero simila al tiu de tetrinkado. La procedo de preparado estas jene: unue distranĉi solidigitan ŝafgrason kaj ĝin fandi en potu, aldoni al ĝi rostitan farunon kaj bolantan akvon, antaŭ ol kuiri ĝin ĝis supiĝo, poste aldoni al ĝi ankaŭ salon, vinagron, dishakitan ŝenoprazon k.a. Tiu nutroriga trinkaĵo utilas al la sano.

Buterteo, oleteo kaj laktoteo estas nemankigeblaj por la ĉiutaga vivo de la supre menciitaj nacimalplimul-
toj ne nur pro bezono, sed ankaŭ pro ĝuo. Ekz., mongoloj kutimas trinki laktoteon matene kaj vespere. Tiam ĉiuj familianoj sidas kune, multe ĝuante la trinkadon, kaj en la tendo regas ne nur bonodoro, sed ankaŭ gaja etoso. ■

Ponto liganta ĉinan kulturon kun la okcidenta

de PANG NAIYING

LA galerio Marlborough de Britio estas internacie aŭtoritata kompanio de artaĝ-agentoj. Ĝi faris kontrakton nur kun pli ol 20 pentristoj en la tuta mondo. El ili Chen Yifei estas la ununura aziano. Komence de 1997 la kompanio okazigis por li rondiran ekspozicion. Laŭ kontrakto ĝi okazis en multaj lokoj kaj daŭris unu jaron. La ekspozonado komenciĝis en Ĉinio. Menciante tion, Chen diris: “Per tio mi rekompencis la patron. Dum mia 17-jara restado en Usono mi ĉiam zorgis pri la valoro de belarto. Mi deziris, ke mia arta praktiko ludu la rolon de kultura ponto inter Ĉinio kaj la Okcidento.”


En liaj olepentraĵoj enkorpiĝis lia nostalgio: La malnova domo post pluvo kaj la ŝtona ponto plena de verdaj lianoj. Jen la loko, kie li pasigis sian infanecon. Profunde amante la pontojn de sia naskiĝloko, li multe pentris ilin. Ankaŭ en la de li pentrita olepentraĵo por UN delikatas ponto. La paca kaj kvieta medio sur la pentraĵo ja konkordas al la celo de UN por defendi la homan pacon. La ponto en la akvolando de Ĉinio profunde impresis multajn okcidentanojn. La posedanto de la internacia belarta galerio Hammer, Usono, same fama kiel Marlborough, alte taksante la talenton de Chen, fariĝis plej frua agento de liaj pentraĵoj kaj aĉetis de li 12 olepentraĵojn unufoje. Kiam li vizitis Ĉinion en 1985, li donacis al ĉina gvidanto Deng Xiaoping la pentraĵon “Paro da pontoj — rememoro pri mia hejmloko”. Jen tiamaniere la pontoj pentritaj de Chen vere ekludis la rolon de kultura ponto inter Ĉinio kaj la Okcidento.

Fakte Chen neniam fiksloĝis en alia lando. En 1980 li veturis al Usono por tie lerni. En 1982 li “pilgrimis” al Eŭropo, lulilo de la olepentraĵoj. En aŭtuno tiujare li revenis al Ĉinio por ekskursi en ĝia akvolando kaj vintre li flugis al Nov-Jorko por tie fari pentradon... Li plurfoje veturis al la Okcidento, por ke liaj olepentraĵoj servu kiel ponto liganta la ĉinan arton kun la okcidenta. Iu okcidenta fakulo diris: “Chen Yifei plene prezentis la ĉinan spiriton per la okcidenta olepentrarto.” La de li faritaj olepentraĵoj “Melodio de Xunyang”, “Amkanto”,

“Nokta Festeno” k.a. ja estas majstroverkoj. Printempe de la 60-aj jaroj Chen faris pentradon en la vilaĝo Zhouzhuang, suda Ĉinio. Iuvespere aŭdiĝis subite klara muziko. Laŭ la sono li direktis sin kaj eniris en telesalonon. Tie li vidis, ke sub lampo kelkaj knabinoj en silkaj vestoj lerte ludas kordinstrumenton kaj dolĉe kantas. La ĉarma vidaĵo vekis en li motivon por pentrado. Li diris: “Mi deziras, ke miaj pentraĵoj ludu la rolon de poemo aŭ kanto, kaj ke oni pli amu la vivon, rigardante ilin.”

Tibeto forte allogas okcidentanojn per sia mistero. Por sperti la tiean vivon, Chen flugadis al tiu loko. Reveninte, li komponis la pentraĵojn “Loĝantoj de Altebenaĵo” kaj “Patrino”. Fine en siaj olepentraĵoj li prezentis fortan nacion per intensaj koloroj kaj reliefaĵoj linioj. Li diris, ke estas la homoj mem, kiuj inspiris lin fari la pentraĵon. Opiniante, ke la tibeta nacio estas tiel honesta kaj brava, ke oni ne povas prezenti ĝin per delikataj linioj, li faris la verkon per kruda stilo.

Chen emas fari pentraĵon en sportvestoj. Li diris, ke pentrado similas al pilkludo: post ŝoto oni devas tuj rapidi al alia loko por denove ŝoti. La simila konduto aperis en lia infanaĝo. Tiam li desaltis de la dua etaĝo de la domo kun ombrelo en la mano, opiniante, ke ĝi servas kiel paraŝuto... Hodiaŭ li estas ankoraŭ riskema. Li faris filmojn per la mono akirita en aŭkcio de liaj pentraĵoj. Li elspezis 3 milionojn da juanoj por la filmo “Pasintaĵo en Ŝanhajo”. Lia dua filmo “Rendevuo en Vespero” partoprenis en la Internacia Film-festivalo en Cannes kaj akiris la premion Manaki. Lia tria filmo “Rifuĝo en Ŝanhajo” rakontas, kiel 30 000 judoj estis protektataj en Ŝanhajo en la Dua Mondmilito. Per la filmo Chen volas vekti indulgemon de la homoj. Pri rilatoj inter pentrado kaj filmado, li emfazis, ke ili ambaŭ estas artoj kaj la malsameco kuŝas en tio, ke la filmo prezentas moviĝantajn bildojn sur ekrano. ■




Chen Yifei kaj lia verko



“Loĝantoj de altebenaĵo”



“Pasintaĵo en Ŝanhajo”



“Duetto”



“Sur kanalo”

“Melodio de Xunyang”







Kashi – plej okcidenta urbo

Teksto de PANG NAIYING


Fotoj de HAN HONG



En Korban-festo



identita de Ĉinio



Fratoj


EN bazaro Kashi-anoj ĉiam krias kun vigleco por vendi siajn varojn, sed tuj fariĝas kvietaj kaj piaj preĝante en moskeo. En tiu aparta etoso vivas nacio ne pure indiĝena.

NACIO DE LA SILKA VOJO

Antaŭ 2 mil jaroj Kashi estis sidejo de la regno Shule vaste konata sur la Silka Vojo. Shule-anoj, kun flava haŭto kaj nigraj haroj, tre similis al la loĝantoj de centra Ĉinio, ĉar antaŭ 6-7 mil jaroj iliaj prapatroj, ĝuĉjang-oj kaj sajĝong-oj, tien migris el oriento. En multaj historiaj libroj oni skribis, ke Shule-anoj havas po 12 fingrojn kaj po 12 piedfingrojn. Laŭ esploro antikvuloj ĝenerale havis tiun trajton. Tamen, post la 5-a jc, sekve de la alveno de komercistoj el Hindio kaj Eŭropo, precipe post enmigrado de sogdoj el Centra Azio, tre lertaj en komerco, Shule-anoj ekhavis altan nazon kaj profundajn okulkavojn. Meze de la 6-a jc al Shule migris multaj ŝjituĝjue-oj, mikssangaj posteuloj de hunoj kaj ŝjanbej-oj, kaj pro tio la lokanoj ekhavis altan staturon kaj bluajn okulojn.

En la 9-a jc hujhu-oj el stepo de norda Ĉinio starigis Kala-hanejon en Kashi. Post tio, dum ĉ. 400-jara asimilado, la prapatroj de Kashi-anoj ekhavis trajtojn, kiajn havas la nunaj lokanoj. Menciindas, ke la reganto de tiu hanejo, ĉiam sin rigardante kiel posteulon de la ĉina nacio, sin titolis ĉina reĝo. Siatempe la hanejo havis alian gravan ŝanĝiĝon, t.e. islamo transprenis la regantan pozicion de budaismo. Pro tio Kashi fariĝis la unua islama regiono de Ĉinio.

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO






En butiko de naciaj muzikiloj



Preparado de rarunaj kukoj



En silka bazaro



Al bazaro



Alilandaj turistoj interesataj de lokaj metiartaĵoj



Ĉiu evoluo de Kashi intime rilatis kun ĝia geografia situo. En la tuĝjue-a lingvo Kashi signifas gemon. Kiel oazo inter la dezerto Taklimakan kaj la altebenaĵo Pamiro, Kashi distancas de Kuqa je 800 km. Ĉar ĝi situas ĉe la okcidenta fino de Ĉinio, en ĝi kuniĝis la branĉoj suda, meza kaj norda de la Silka Vojo. Dank' al tio, tie ekviglis antikvaj foiroj, prosperis religioj kaj naskiĝis uĝuroj, kiuj havas sangon de indiĝenoj, sed malsaman aspekton.

MOSKEO ETIGAR

Frumatene el la angula turo de la moskeo Etigar en Kashi aŭdiĝas voĉo de imamo laŭta, sonora kaj tirata por voki islamanojn al preĝo.

Ĉar 2.7 milionoj da uĝuraj Kashi-anoj kredas je islamo, en la urbo Kashi estas pli ol 9 600 moskeoj kaj en ĝiaj vilaĝoj ĉiu dua aŭ tria familio pasadas unu moskeon.

Tute diferencaj de budaistoj, islamanoj kredas nur je Alaho kaj kultas neniun idolon. Pro tio ili faras preĝadon ĉiutage 5-foje ne en tagmezo nek en tempo, kiam la suno leviĝas aŭ subiras, por eviti suspekton kulti la sunon. Kaj la signo de novluno sur moskeo memorigas sanktan momenton. Laŭdire, en iu novluna nokto de la naŭa monato laŭ la islama kalendaro Alaho inicis profeton Mahometo pri "Korano". Post tio tiu monato fariĝis fasta monato de islamanoj. En Kashi, vespere de tiu monato, antaŭ leviĝo de novluno, islamanoj venas en moskeon por serĉi delikatan lunarkon okcidente. Ĝin vidinte, ili ekfastas, nur vespere ili prenas manĝaĵon. Ili tiel faras ĝis la lasta vespero de tiu monato, kiam ili denove vidas la lunarkon. Kaj la sekvantan tagon estas la fastorompa Korban-festo.

Tio estas solena festo. Dekmiloj da islamanoj genuiĝis sur la placo de la moskeo Etigar por fari preĝadon. Poste, akompana-

te de tamburado kaj blovinstrumenta muziko, ili dancas Samadanco. Tio daŭras 3 tagojn. Pasiaj uĝuraj viroj ofte saltas por fari turniĝon je 180° kun ritmo drasta kaj kruda. Laŭdire tiu antikva religia danco naskiĝis dum milito inter islamanoj kaj alireligiuloj. Siatempe islamanoj tamburadis kaj ludis blovinstrumentojn por sin kuraĝigi kaj preĝis, por ke Alaho benu kaj protektu ilin. Post la venko ili dancis akompanate de tamburado kaj muziko de blovinstrumentoj...

La moskeo Etigar staras en la centro de la urbo. En la moskeo prosperas altaj poploj. Sub ili gaje saltis turtoj, kiuj neniom terurigiĝis pro nia alveno. En la flanka preĝejo ni intervjuis 75-jaran imamon de la moskeo. La maljunulo, kun blanka turbano kaj griza barbo pendanta malsupren ĝis la brusto, atente aŭskultis nin kaj poste afable respondis niajn demandojn.

La moskeo Etigar konstruiĝis en 1442. Siatempe ĝi estis malgranda. En la 18-a jc iu islamano donacis al ĝi ĉ. 70 hektarojn da tero. Poste alia islamano donacis al ĝi sian tutan havaĵon antaŭ sia morto pro malsano dum la vojaĝo al Mekko. Nun la moskeo Etigar estas la plej granda en Ĉinio. En ĝi preĝas ne nur islamanoj de Kashi, sed ankaŭ tiuj el arabaj landoj.

La maljunulo ne nur predikas en la moskeo, sed ankaŭ iras al la hejmo de tiuj islamanoj, kiuj havas 3-tagan bebon, por doni nomon al ĝi. Li murmuris ĉe ĝia dekstra orelo: "Nur Alaho estas nia majstro. Li estas granda..." kaj ĉe ĝia maldekstra: "De nun vi estas islamano, mi gratulas vin." Poste li rulas la bebon surtere por sugestis al ĝi, ke ĝi venku malfacilojn dum sia vivo kaj nun kunfandiĝu kun la tero...

7-jaraj knaboj povas loĝi en moskeo por lerni Koranon. 4-5 jarojn poste, ili ellernas la araban lingvon kaj povas bele skribi en

ĝi. La moskeo Etigar estas islama altlernejo por kulturi tiuflankajn fakulojn. Ĝiaj lernantoj aĝas plejparte 18-28 jarojn.

BAZAROJ

Inter kvietaj moskeoj grandaj kaj malgrandaj prosperas movoplenaj bazaroj de tranĉiloj, ceramikaĵoj, ĉapoj, tapiŝoj, juveloj, brutoj, jahurtoj k.a. La moskeo Etigar estas ĉirkaŭita de ili kaj el ili la bazaro Anjiang servas al klientoj speciale per silko. Antikve multaj uzbekaj komercistoj, transirinte Pamiron, kolektiĝis tie por komercado. Norde de la moskeo etendiĝas metiartaĵa strato kun butikoj kvaŭ pendantaj sur muroj.

Mi vizitis butikon de muzikiloj. Sur ĉiuj ĝiaj muroj pendas kordinstrumentoj kaj tamburoj. En ĝi sidis maljunulo tre lerta en ludado de kordinstrumento. Li konigis al mi, ke la kordinstrumento simila al granda ligna ĉerpilo nomiĝas Tanbor. Ĝi sonas agrable. Antaŭe kiam iu muzikisto ludis ĝin, al li kolektiĝis aro da alaŭdoj... Vidinte, ke germanaj geedzoj interesiĝis pri la kordinstrumento Ajĝjek, la maljunulo tuj prenis ĝin kaj ludis la faman hispanan muzikaĵon "Toreisto". La germanaj klientoj senĉese kapjesis kaj notis la nomon de la muzikilo... Fakte, la maljunulo estis najbaro de la juna mastro, kiu absorbiĝis en kordinstrumento-farado. La junulo diris al mi, ke sur la Silka Vojo Kashi-aj muzikiloj ĉiam estas famaj kaj lia metio estas heredita. Lia komerco ĉiam bone iras. Alilandaj turistoj, kiuj aĉetis liajn muzikilojn, plejparte restis tie, ĝis ili ellernis la ludadon.

Kashi-anoj ŝatas viziti bazarojn. Tie troviĝas ĉiaj manĝaĵoj. Iuj knaboj vendas figojn platigitajn kaj metitajn en formo de piramido en lignan pleton. Tie oni povas aĉeti tranĉaĵojn de Hamimelono. Vaporuminte farĉitajn farunaĵojn, oni ĉiam laŭte vokas

la nomon de Kuira Dio, ĉar ŝajne ju pli laŭte oni krias, des pli bongustas la farunaĵoj... La bazaro estas paradizo de bongustaj manĝaĵoj. Sub la arda suno, ĉe forno, iuj preparas vermiĉelojn, aliaj farĉon kaj triaj pladojn, ili ĉiuj laboras lerte kun gajna mieno.


Ĉe la strato kelkaj ŝedoj servas kiel ripozejo por maljunuloj el kamparo. Sidante sur la lito ili manĝas platforman kukon rostitan, trinkante teon. Siatempe, kiam bonzo Xuanzang de Tang-dinastio (618-907) trapasis dezerton dum sia vojaĝo al Okcidento por peti sutron, li kunportis ĝuste tiajn kukojn. Antaŭ ol manĝi ilin, li metis ilin sub varman sablon kaj kelkajn minutojn poste, ili farigis fragilaj.

ĈE ORDINARAJ STRATETOJ

La loĝdomoj ĉe landlimo estas plej simplaj kaj plej belaj. La stratetoj al moskeoj kaj bazaroj ĉiuj estas flavaj. Ĉar en Kashi malmultas pluvo, la teraj etaĝdomoj kun plata tegmento estas uzeblaj por dekoj da jaroj. En ĉiuj kortoj belas floroj. En la ĉambroj bele dekoraciitaj buntas tapiŝoj kaj sur muroj kaj sur planko. En niĉoj kun gravuraĵoj estas arĝenta teservico el Pakistano...

Tamen la plej belaj estas knabinoj. La naturo dotis ilin per ĉarmo. Gastante ĉe Abudu Klimu, mi propraokule vidis, kiel ili sin ŝminkas. Ili plukis florojn el florbedo, ilin purigis, dispecigis kaj premis. Per ties suko ili pentris siajn brovojn ĝis la tempioj.


Knabino Aliya diris al mi, ke oni pentras la brovojn per natura suko el vegetalo ne nur por ilin beligi, sed ankaŭ por ilin nutri. Kashi-aj knabinoj pentras la brovojn de infaneco, pro tio iliaj brovoj estas brile nigraj. Mi demandis ŝin, ĉu ne estas malfacile fari tiom multe da harplektaĵoj. Ŝi respondis, ke ŝia patrino helpis ŝin en harplektado, kiu bezonas unu horon. Post ŝmirado de oleas-



La moskeo Etigar


tra gumo, la harplektaĵoj ne plu bezonas prizorgon dum unu semajno. Oleastroj kreskas en dezerto. Miksite kun akvo, ilia gumo estas uzebla... La knabinoj, kiuj portas surkape ĉapon kun brilaj ornamaĵetoj kaj silkan jupon kun koloraj strioj, aspektas pli ĉarmaj.

Kiam la knabinoj dancis kantante, mi parolis kun la mastro pri ilia eduko. De li mi informiĝis, ke la knabinoj de la islamaj familioj devas agi laŭ la religiaj reguloj ekde sia aĝo de 9 jaroj. Iliaj gepatroj tre atentigas kulturi en ili ĝentilecon, bonkorecon kaj bonajn kutimojn pri pureco. Kompreneble, ili devas lerni ankaŭ sciencajn sciojn. Lia 18-jara filino, kiu ŝatis de sia infaneco brodadon kaj tajladon, eklaboris kiel tajlorino, diplomiĝinte el mezlernejo. Kiel bona lernantino, lia plej juna filino vizitas elementan lernejon. Li volas, ke ŝi lernu medicinon estonte. Diplomiĝinte el la Xinjiang-a Politekniko en la 70-aj jaroj, li ekokupis sin pri tekniko. Ĉar lia familio sin okupas tradicie pri komercado, li vivas sufiĉe riĉan vivon. 4 jarojn antaŭe lia familio konstruis etaĝdomon el brikoj. Li aĉetis aŭton kaj dufoje pilgrimis al Mekko. Li diris, ke tien pilgrimi unufoje dum la vivo estas unu el la 5 lecionoj de islamanoj, sed estas



75-jara imamo

malpermesite plenumi tion per pruntepreno de mono aŭ almozpeto. Post kelkaj jaroj li refoje vizitos Mekkon, ĉar liaj geavoj loĝas tie kaj liaj gepatroj — en Uzbekistano. Jen lia islama familio mikssanga. ■



Preço en la moskeo Etigar



Gaja familio



Ujguroj lertaj en dancado

Lako kaj lakmetiaro

de QIAO SHIGUANG



ĈINIO estas lando de ceramikaĵoj, silkaĵoj kaj ankaŭ lakaĵoj. El antikva tombo elfosiĝis vermiljone lakita ligna bovlo farita antaŭ sep mil jaroj. La arkeologia eltrovo de nombro da delikataj lakaĵoj montras, ke 2 500-2 000 jarojn antaŭe, en Ĉinio la lakmetiaro jam multe disvolviĝis. Nun la lak-skulptaĵoj konservataj en diversaj muzeoj de la mondo plejparte estis faritaj en Ming- kaj Qing-dinastioj.

Lako uzata en lakmetiaro devenas de rezino de lakarbo. Lakarbo estas plurjaraj kaj deciduaj arboj, al kiuj konvenas milda klimato. Ili plejparte kreskas en montregionoj de Shaanxi (Ŝenŝji)-, Hubei-, Sichuan- kaj Guizhou-provincioj de Ĉinio, kaj en Japanio, Koreio, Vjetnamio kaj Birmo. Tio karakterizas lakmetiaron per orienta gusto.

Kiam lakarbo kreskas 8-9 jarojn, eblas rikolti lakon. Ĝenerale oni entranĉas la trunkon, sub ĝin metinte bambuan tubon aŭ konkon, laŭ kiu lako malrapide elfluas. La primitiva formo de la ĉina ideogramo de lako konsistas el du partoj: la supra estas signo de ligno signifanta arbon, la malsupra — signo de akvo signifanta rezinon, inter la du partoj estas du oblikvaj strekoj etenditaj maldекstren kaj dekstren signifantaj bambuajn tubojn, laŭ kiuj lako elfluas.

Lakarbo estas valora. Ĝia ligno taŭgas por fari ilon tineo-rezistan; ĝia frukto konvenas por fari vakson; ĝia kerno por elpremi oleon; ĝiaj floro kaj folio estas uzataj kiel drogoj. Kompreneble ĝia lako plej valoras. Kiel gluaĵo, ĝi estas tiel glueca ke en Ĉinio estas la idiotismo “intima kiel gluaĵo aŭ lako” por esprimi la intimecon inter geedzoj; kaj la antikvaj ĉarpentistoj, tanistoj,



metalprilaboristoj estis nedisigeb-
blaj de lako. Kiel protektanto, ĝi
estas izolema kaj rezistema kon-
traŭ malsekeco, putreco, rusto kaj
frotado; en la urbo Changsha de
Hunan-provinco, en Mawangdui-
ruino elteriĝis kadavro de dumil
jaroj, ĝia haŭto estas ankoraŭ elas-
ta, tio multe rezultas de la ĉerko
kun tri tavoloj da lako. Kiel or-
namilo kun delikata brilo, mik-
siĝinte kun pigmento, ĝi povas esti
uzata por ŝmiri, aŭ artisme, sur
objektojn lignan, ledan kaj bam-
buan... t.e. lakmetiarto.

En la periodo de Militantaj
Regnoj (475-221 a.K.) jam plan-
tiĝis lakarboj. La tiama filozofo
Zhuangzi (Ĝuangzi) sin okupis
kiel ŝtatoficisto pri mastrumado
de lak-ĝardenoj. Li menciis lakon
en sia libro: "Lako estas utila, tial
oni ĝin kolektas." La fama poeto
Wang Wei de Tang-dinastio vivis
ermite en sia maljuneco. Li havis
lakan ĝardenon, faris lakpentraĵojn
kaj verkis prilakajn poemojn.

Dank' al penado de genera-
cioj da metiistoj, la funkcio kaj
beleco de lako estas sufiĉe mon-
trataj.

La ĵus el trunko elfluinta lako
estas blanka. Post oksidado kaj
sekiĝo ĝi fariĝas ruĝbruna. Soli-
da lako estas preskaŭ nigra. Tial
lako ankaŭ signifas nigron. En la
ĉina lingvo troviĝas la esprimo
"lake nigra". Nigro estas la baza
koloro de lakmetiarto. Pri antikvaj
lakaĵoj oni diris: "Tiu lakaĵo, kies
koloron oni ne indikis, estas ni-
gra."

La alia ĉefa koloro de
lakmetiartaĵo estas vermiljono. La
lako, miksiĝinte kun hidrarga
sulfido fariĝas vermiljona. Ĉinaj
antikvaj lakaĵoj senescepte estas
nigraj aŭ vermiljonaj, aŭ kun ver-
miljona interna surfaco kaj nigra
ekstera supraĵo. La antikvuloj
opiniis, ke "ruĝa lakaĵo sen
ornamaĵo estas sufiĉe bela". Eble

ĝuste estas la koloroj nigra kaj
vermiljona, kiuj naskis la estetik-
guston de ĉinoj, kiuj ĝis nun
preferis tiujn du kolorojn. En la
Printempa Festo oni kutimas al-
glui al pordo vers-paron kun ni-
graj skribaĵoj sur vermiljonaj
papiroj, opiniante ilin bonaŭguraj.

Por riĉigi la kolorojn de
lakaĵoj, la lakistoj aŭ inkrustis
lakaĵojn per perlamoto, oro, arĝen-
to ke., aŭ ĉizis strekojn sur la
surfaco de lakaĵoj por doni kolor-
ojn, utiligante la gluecon de lako.
Krome oni ŝmiris dek, kelkdek,
eĉ cent tavolojn da lako sur kru-
da tipo kaj faris skulptadon, nome
lak-skulptaĵo.

Lakaĵoj estas ĉefa formo de
lakmetiarto. Por fari lakaĵon oni
devas unue prepari lignan, bam-
buan, ŝtofan, ledan, ceramikan aŭ
oran krudan tipon. En la antikve-
co produktiĝis lakaĵoj por diver-
saj uzoj, ekz. manĝiloj, mebloj,
boatoj, veturiloj, pontoj, ĉerkoj,
eĉ kiraso, pafarkoj, sagoj, ŝildoj,
seloj... Interalie pli multnombraj
estas manĝiloj de korteganoj. En
la supre menciita Mawangdui-
ruino elteriĝis ĉ. 500 lakaĵoj, kies
duono estas manĝiloj. Antaŭ 2 000
jaroj en Sichuan, produktejo de
lako, fondiĝis granda ŝtata farejo
de lakaĵoj, kun laboristoj pri for-
mado, pentrado, kolorigo, inkrus-
tado, gravurado ktp.

En la 3-a jarcento, pro evoluo
de budhismo oni inventis la me-
todon fari lakitan budho-statuon
kun tipo el ramia ŝtofo. Tia bud-
ho-statuo kun alteco de 3 metroj
estas tiel malpeza, ke unu homo
povas levi ĝin.

Kiam Ming-dinastia imperi-
estro Zhu Di estis sur trono dum
1403-1425, en Pekino aperis kor-
tega farejo de gravuritaj lakaĵoj
kaj verko pri lakmetiarto, la unua
en Ĉinio. En 1914, lakistoj faris
ekranegon "Feoj gratulas Dion pro
lia naskiĝtaga datreveno". La brila

ekranego kun delikate gravuritaj
montoj, riveroj, floroj, homfi-
guroj, kioskoj, birdoj kaj bestoj
en legendoj gajnis la unuagradan
premion en la Universala Foiro
en Panamo.

Samkiel la silkaĵoj kaj
ceramikaĵoj, la ĉinaj lakaĵoj dis-
vastiĝis laŭ la Silka Vojo. El an-
tikva tombo en Turpan elfosiĝis
stako da teleroj lakitaj antaŭ trimil
jaroj. La ligna internaĵo jam pu-
tris, tamen la desegnoj de nuboj
kaj fiŝoj sur la vermiljona laka
surfaco ankoraŭ estas klaraj. En
la 17-a kaj 18-a jarcentoj, lakaĵoj
trovis ŝaton de eŭropanoj. La fran-
ca reĝo Luizo la Dekkvara ne nur
metis en la palacon ĉinajn lakit-
ajn tablojn kaj seĝojn kaj cerami-
kajn florvazojn, sed ankaŭ enlis-
tigis ilin en la katalogon de sia
posedaĵo. Laŭdire, rusa caro Pe-
tro la Unua foje lernis lakadon de
metiisto, kiu lertis en imitado de
ĉinaj lakaĵoj. En virinaj lernejoj
de Anglujo iam estis leciono de
lakado. Tiam lernado de lakarto
estis modo.

En la nuntempa lakmetiarto
troviĝas ankaŭ lak-pentrado, kiu
naskiĝis kiel dependa formo de
lakaĵoj. En la 60-aj jaroj de tiu ĉi
jarcento ĉinaj pentristoj kaj lak-
metiartistoj kune starigis sende-
pendan sistemon de lakpentrado
kaj okazigis en 1984 ekspozicion
de lakpentraĵoj en la Ĉina Belar-
ta Domo. De tiam aperis pli kaj
pli da lakpentristoj kaj
lakpentraĵoj. Oni eĉ okazigis eks-
poziciojn de lakpentraĵoj en Eks-
Sovetunio, Japanio kaj Koreio.

Kompreneble, kiel tradicia
kulturo la ĉina lakmetiarto renkon-
tas defion de modernaj kulturo kaj
industrio. Tamen kun senĉesa
plialtiĝo de vivnivelo, oni deziras
revigliĝon de la tradicia kulturo,
precipe de la lakmetiarto kun
lakaĵoj, lakpentraĵoj kaj lak-
skulptaĵoj kiel ĝiaj formoj. ■

Parolante pri riska esplorado, ekscitiĝis multaj junuloj, kompreneble ankaŭ la ĉinaj. Ili aŭ piediras, aŭ biciklas, aŭ flosas, aŭ grimpas rokon, celante la lokon, kiun aliaj malofte atingis, por sperti ĝojon de aventuro. Li Yongsheng estas unu el tiuj junuloj.

Yu Tao

LA 34-jara Li Yongsheng altas 1.82 m, kun haroj longaj ĝis la ŝultroj kaj barbo ŝajne neniam tondita. Li ĉiam portas la kamuflan veston kun grandaj ideogramoj — “Saluton, mia patrolando!” kaj malgrandaj — “piedire kaj bicikle esplori la 56 naciojn en Ĉinio”. Por tiuj vortoj, en marto de 1989, li adiaŭis siajn familianojn kaj komencis vojaĝi piede kaj bicikle. En la pasintaj 8 jaroj li iris 100 000 kilometrojn kaj spertis diversajn suferojn — sur stepo de Interna Mongolio lin atakis neĝstormo; sur altebenaĵo de Tibeto lin persekutis lupoj; en tropika arbaro de Yunnan li batalis kontraŭ vipuro... Aprile de 1992, li trairis la dezerton Taklimakan en Xinjiang. Pasintjare, li kvarfoje enpaŝis en la “senvivejon” Lopnur kaj Loulan. Li iĝis heroo en la vera senco de la vorto.

“BERMUDOJ” EN OKCIDENTA ĈINIO

Lopnur, situanta inter 88°-92° E, 39°-41° N, estas la plej malalta loko de la baseno Tarim. Antaŭe ĝi estis vaganta sallago, poste ĝia akvo malaperis kaj ĝi iĝis mino de silvino.

Lopnur famiĝis pro sia timinda mistero. En 1981 kaj 1996, respektive mortis tie sciencisto kaj esploristo de Ĉinio. La lasta, kiu havis ambicion same kiel Li Yongsheng, eterne kuŝas en Lopnur de

malpli ol unu jaro antaŭ lia ekiro. La klimato en Lopnur estas tre malbona. En printempo kaj somero estas seke kaj varmege, ĝenerale en somero la temperaturo superas 45°C, kaj tiu de la surfaca sablo atingas eĉ 70°C. Ĉiujare ventas 5 monatojn. Kiam ekventas, sablo leviĝas kaj vualas la sunon. Multas sablaj montoj kaj valoj en Lopnur, tial oni ofte devojiĝas. Pro tio oni nomas Lopnur “Bermudoj” en okcidenta Ĉinio.

Pro la speciala valoro de Lopnur en geografio kaj arkeologio, ekspedicioj kaj esplorantoj de tempo al tempo iris tien, spite la teruron kaj danĝeron. Li Yongsheng ne estas la unua nek estos la lasta vizitanto de Lopnur, sed lia travivaĵo ne estas ordinara.

ENIRO EN “KAMPADEJON”

La 17-an de majo 1997, Li Yongsheng foriris de Korla de Xinjiang, urbo plej proksima al Lopnur. Kelkaj urbanoj helpis lin elabori du-radan puŝĉaron, donacis al li foto-filmojn, rekomendis al li manĝi kaj tranokti ĉe iliaj konatoj.

Li venis al vilaĝo okcidente de Lopnur. Post multjara ekspluatado de tero, tie kreskas tritiko, rizo, maizo kaj kotonujoj. Staras vicoj da popoloj, kiuj ŝirmas la kampojn kontraŭ vento kaj sablo. La oazo en la dezerto ekscitis lin. Li kredis, ke la kuraĝo de esploristoj transpasos la limon de homa forto, ĉar la ekspluatantoj kreis mi-

Li eniris en senv

de **ZHOU SHAOHUA**

raklon en la dezerto. Antaŭ la ekiro al Lopnur li metis 20 farunajn kukojn kaj 20 kg da dolĉa akvo en la ĉaron. Al la vilaĝanoj, kiuj venis adiaŭi lin, li ĵuris, ke li revenos viva.

La 25-an de majo, li trovis tendaron de prospektoroj pri nafto. Ili varme bonvenigis la neatenditan gaston. En kunmanĝado kaj babilado li amikiĝis kun ili kaj informiĝis, ke la tendaro situas nordokcidente de Lopnur, nur 70 km for de ĝia okcidenta bordo.

Do la tendaro fariĝis lia kampadejo. Ili multe helpis lin.

LA UNUA ENIRO EN LOPNUR

Matene de la 26-a, li ekiris al Lopnur kun akvo kaj manĝaĵo donitaj de ili. Du horojn poste, li atingis sekan rivervalon, kie kreskas eŭfrataj poploj kaj tamarikoj. Li eniris regionon de “yardang”, kiu estas ujugura vorto kun la signifo “monteto”. Tie multas montetoj kaj valoj. Li vidis mongolajn gazelojn, sovaĝajn kamelojn kaj azenojn. Sed ju pli li antaŭen iris, des pli malmultiĝis signoj de vivaj estaĵoj. Li tranoktis en sablokavo. Matene de la 27-a, li daŭre iris. En la tagmezo estis varmege, la temperaturo — 38°C, kaj tiu sur la tersurfaco — 56°C! Restis nur duonpoto da akvo. Li klopodis iri pli foren, samtempe faris

vejon



Li Yongsheng ĉe la ruino de la budhisma pagodo en Loulan

esploradon kaj fotadon.

Li vidis antikvajn restaĵojn, iuj el ili estis detruitaj — tombejo priŝtelita kaj ĉerko movita apuden. Fine Lopnur iris en liajn okulojn. Tie etendiĝas blanka alkala tero, en malproksimo ĝi tre similas al lago plena de akvo. Verŝajne ĝi rakontas la ŝanĝiĝojn de la lago en miloj kaj miloj da jaroj. Li Yongsheng fikse rigardis, longe kaj silente.

Lia akvo preskaŭ elĉerpiĝis, li revenis al la kampadejo.

TRANSVIVI MALESPERON

Post kelktaga ripozo, li restartis. Sed li perdis la direkton, liaj piedoj estis vunditaj de sal-krusto. Li revenis kun bedaŭro. Kelkajn tagojn poste, ekis lia tria marŝo.

Estis varmege. Li piedis nokte kaj ripozis tage. En ombrejo de sabla monteto li kuŝis kiam la suno kruelis, kaj post sunsubiro li leviĝis. Noktomeze, inter forvelkintaj eŭfrataj poploj kaj tamarikoj li aŭdis krakadon, kiun produktis la branĉoj pro granda ŝanĝiĝo de temperaturo tage kaj nokte. Tute sola aŭskulti en dezerto la naturan sonon estis sperto neordinara en lia vivo.

Li atingis la centron de Lopnur. Tie estas ebena sala tero kun sablaj montetoj. Li vidis restaĵon de bukĉeno kaj koralo, kiuj pruvas, ke Lopnur ja estis granda lago.

Sur revena vojo, liaj

TUĈFROTUJO

Alilandaj turistoj en Ĉinio kun granda intereso aĉetis kiel memoraĵon la kvar specojn de skribiloj, nome peniko, tuĉo, *Xuan*-papero kaj tuĉfrotujo. Inter ili *Duan*- kaj *She*-tuĉfrotujo estas aparte ŝatataj.

Duan-tuĉfrotujo farita en Duanxi-gubernio, Guangdong-provinco, estas nesorbema kaj delikata kiel jado kun naturaj vejnoj. Dum frotado aŭdiĝis agrabla sono. Laŭ ĝiaj naturaj vejnoj metiistoj faris diversajn gravuraĵojn pri bestoj, montoj kaj riveroj. Tial *Duan*-tuĉfrotujo estas ne nur skribilo, sed ankaŭ delikata artaĵo.

She-tuĉfrotujo produktita

en Wuyuan, Jiangxi-provinco, karakteriziĝas per fortikeco de materialo kun subtilaj vejnoj. Unu el la materialoj por tiuspeca tuĉfrotujo estas el diverskolora ŝtono kun vejnoj en formo de homaj brovoj, longaj kaj mallongaj, dikaj kaj maldikaj, densaj kaj maldensaj, tial ĝi portas ankaŭ la nomon brova ŝtono. La plej fama *She*-tuĉfrotujo estas farita el ŝtono kun vejnoj similaj al sovaĝaj anseroj sur lago. Estas ankaŭ speco de ŝtono, sur kiu brilas oraj naturaj steloj en grandeco de rizgrajnoj. En la lastaj jaroj la metiistoj de la gubernio jam produktis pli ol mil specojn da belformaj tuĉfrotujoj el tiuspeca

ŝtono.

TAJLOREJO DE GEEDZOJ

La 20-kvadratmetra tajlorejo de geedzoj Cao kun ŝildo "speciale por manĉuraj roboj" sidas en malgranda strato de Pekino.

Tajlora tablo, malnovtipa kudromaŝino kaj elektra gladiĵo jam uzata pli ol 30 jarojn ja estas ilia propraĵo por fari manĉurajn robojn. S-ro Cao eklernis la tajloradon en la aĝo de 11 jaroj. Pasintecce pluraj artaj majstroj en la ĉina drama rondo petis geedzojn Cao fari dramajn kaj ordinarajn vestojn. Nuntempe ne plu furoras la

manĉura robo, tamen ĝi, kiel tradicia vesto, estas ankoraŭ alte taksata. Kaj en gravaj okazoj ĉinaj virinoj ŝatas porti tian robon. Pro siaj afableco kaj lerteco en tajlorado, la geedzoj estas multe vizitataj.

En la lastaj jaroj nemalmultaj alilandaj studentinoj en Pekino farigis al si tian robon en la tajlorejo. Ili diris: "Ni studas la ĉinan kulturon, kaj estas pli signife, ke ni



Geedzoj Cao en sia tajlorejo

akvo kaj manĝaĵo preskaŭ elĉerpiĝis. Varmego kaj soifo suferigis lin. Foje li eĉ intencis sin mortigi aŭ sensoifigi sin per sia sango. Tamen li sin detenis kaj ne tion faris. Li kolektis sian urinon kaj de tempo al tempo trinkis iom. Li konservis ankoraŭ iom da dolĉa akvo, sed li ne kuraĝis el-

trinki — ĝi estis garantio por la plej kriza momento.

14 tagojn poste, li revenis al la tendaro, elĉerpita, tamen viva.

RENKONTIĜO KUN LOULAN

Personoj el iu turisma agentejo venis serĉi la ruĵon de la an-

tikva urbo Loulan. Ili kondukis aŭton tuttage, sed ne trovis ĝin. Ili renkontis Li Yongsheng kaj petis lian helpon. Li konsentis. Ilia aŭto atingis lokon kelkajn kilometrojn for de Loulan kaj ne povis plu antaŭeniri, ĉar ne estis vojo. Ili do tranoktis surloke. La sekvan matenon ili piediris al

portas veston kun koloro de la tradicia ĉina kulturo.”

Tradicie oni faras tian robon per la manoj kaj la laboro estas delikata kaj peniga. Kvankam la geedzoj sentas, ke ilia volo superas la povon, tamen ili ne volas perdi sian tradician metion. Videble, la geedzoj jam rigardas faradon de la manĉura robo kiel parton de sia vivo.

Nun ili heredigis sian tekton al sia filino.

ALILANDAJ KUIRISTOJ EN PEKINO

De post 1979, kiam iuj alilandaj kuiristoj eklaboris en la hotelo Jianguo kune investita de Ĉinio kaj alia lando, multaj alilandanoj sekvis ilian ekzemplon en diversaj hoteloj de Pekino. Itala direktoro de la Venecia Restoracio de la hotelo Kempinski konfesis: “Mi intencis labori en Sud-Ameriko, tamen tie mankas kontentiga itala restoracio, tial mi estis engaĝita en Pekino, kaj rimarkis, ke en tieaj grandaj hoteloj troveblas tipaj italaj restoracioj. Mi opinias, ke tion ni ŝuldas al alveno de multaj alilandaj turistoj, krome la nunaj pekinanoj ŝatas novan guston.”

La lokaj kaj alilandaj kuiristoj kunlaboras harmonie. En ripoza tempo ili ŝercas kaj kune trinkas vinon. Pekinaj kuiristoj iam enviis, ke la alilandaj kuiris-

toj estas alte salajrataj, tamen ili admiras ilian diligentecon en la laboro. Laŭ regulo, la alilandaj kuiristoj laboras kvin tagojn kaj duonon semajne, fakte ili ofte faras ekstran laboron.

Alilanda kuiristo de la Palaca Hotelo bunte ormanis sian oficejon. Sur la muro pendas granda olepentraĵo de 5 alilandaj kuiristoj. Li diris, ke li dufoje vizitas golfejon ĉiumonate, ofte promenas surstrate kaj en parkoj akompanante siajn edzinon kaj 4-jaran filinon. Ili ekskursas per biciklo. Li diris, ke li preferas manĝon en ĉestrata manĝejo al tiu en hotelo.

La edzino de iu alilanda kuiristo de Gloria Plaza Hotelo laboras kiel instruistino en Singapuro. Ŝi ĉiam pasigis siajn feriojn en Pekino. La edzo mal multe skribis al ŝi, ĉar ŝi preferis ofte aŭdi lian voĉon telefone.

NORDA SALAMANDRO EN XINJIANG

Frusomere de 1990 iu paŝtisto en Xinjiang trovis en rivereto “fiŝon” kun serpenta kapo, kvar piedoj, maldika kaj longa vosto.

Wang Xiuling, instruistino de la biologia fakultato de la Xinjiang-a Normala Universitato, kaj ŝiaj kolegoj asertis, ke tiu “fiŝo” ja estas norda salamandro. Kiel amfibio, ĝi loĝas en la mallarĝa regiono de Alatao-

montaro de Ĉinio kaj estas enlistigita en la ruĝan libron de la Internacia Unio de Protektado de Naturo kaj Naturaj Riĉfontoj. Laŭ donitaĵoj la nordaj salamandroj de Xinjiang aperis pli frue ol dinosaŭroj, tial oni nomas ĝin “la unuaj dinosaŭroj”. Malfeliĉe, post kiam iu okcidenta zoologo la lastan fojon trovis tiajn salamandrojn en 1866, ili mistere “malaperis” sur la terglobo. Iuj famaj ĉinaj zoologoj plurfoje serĉadis ilin, sed trovis neniun. Tial nemalmultaj zoologoj opiniis, ke la norda salamandro de Xinjiang antaŭlonge jam pereis kiel dinosaŭroj.

Wang Xiuling kaj ŝiaj kolegoj venis al la rivereto kaj trovis pli ol 600 nordajn salamandrojn de Xinjiang. Poste ili trovis en alia loko 8 000 tiuspeci-ajn salamandrojn. Oni publikigis la informon en la influa ĉina gazeto “Zoologia Studo”.

En la Xinjiang-a Normala Universitato Wang Xiuling konstruis grandan basenon, metis en ĝin 26 nordajn salamandrojn kaj nutris ilin per lumbrikoj. Pasis du jaroj, ŝi uzis multe da rimedoj, tamen ili demetis neniun ovon. Poste ŝi malaltigis per glacio la temperaturon de la akvo ĝis ĉ. dek gradoj. La 2-an de majo 1991 la nordaj salamandroj fine demetis 43 ovojn. Post unu monato 35 salamandridoj naskiĝis en vitra vazo.

Loulan.

Tre feliĉe, ili trovis la celon. Alta teramaso majestas sur la altebenaĵo, jen simbolo de Loulan — ruino de budhisma pagodo.

En Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.), Loulan estis oaza regno, rigardata kiel brila perlo sur la Silka Vojo. Sed poste ĝi malaperis

en la sablomondo. De la komenco de la 20-a jarcento, multaj venis por trovi ĝian ruinon.

Li Yongsheng vidis tie ruinon de muroj, bazon de loĝdomo el ligno kaj fragmitoj, pecojn de fajencaĵo, bronzaĵojn, sagpintojn... La piedo de muro suferis de sablovento kaj la muro preskaŭ falis. Ĉiuj estis eks-

cititaj. Li Yongsheng larmis, ĉar realiĝis lia revo multjara.

Revenante, ĉiuj gaje kantis lokan popolkanton, kvankam tre lacaj. Por Li Yongsheng, finiĝis nur malgranda etapo de lia esplora sperto. En kantado lia penso flugis al la venonta celo, eble dezerto, eble neĝomonto sur altebenaĵo. ■

Vojo al Bermuda



Ĉinaj briĝistoj (la unua de dekstre kaj la dua de maldekstre) en monda ĉampionado inter fortaj briĝistoj

NENIU estas profesia el la ses membroj de la Ĉina Vira Briĝa Teamo, eĉ en la tuta lando. Neprofesieco signifas mankon de regula trejnado kaj malmultecon de enspezo. Tio kaŭzis, ke iuj elstaraj briĝistoj forlasis la sporton. Tiuj ses homoj havas, krom amo al briĝo, ankaŭ la gloron membriĝi al la landa teamo, kio ebligas al ili havi pli multe da ŝancoj partopreni matĉojn enlandajn kaj internaciajn. Ĝuste pro la gloro ili sin dediĉas al briĝo, malgraŭ ĉagrenoj materiaj kaj spiritaj.

KONKURSO POR GLORO

La Ĉina Vira Briĝa Teamo fondiĝis en 1982. Tiam ĝi postiĝis en Azio kaj kompreneble ne povis rivali kun potencaj teamoj en la mondo. Ĝi povis nur soifi la Mondan Teaman Ĉampionadon de Bermuda-pokalo, trans Pacifiko.

Ĝenerale, tekniko estas grava en sporto. Tamen sennombraj

matĉoj montras, ke triumfo finfine apartenas al tiuj, kiuj estas firmvolaj kaj persistemaj. Ĝuste dank' al siaj firma volo kaj persistemo la ĉinaj briĝistoj pasigis la malfacilajn jarojn post la fondiĝo de sia teamo, eble tiam ilia tekniko ankoraŭ ne estis tiel perfekta kiel nun. Pan Kaijian (Pan Kajĝjan), eksa ĉeftrejnisto de la teamo, tiel diris pri la konkurso inter ĉinaj kaj alilandaj briĝistoj: "Ili povas venki nin per 100:60, 100:99, aŭ per 100:1, 100:2, tamen ili ne povas malebligi al ni gajni poentojn. Tio signifas, ke ni povas kuratingi ilin iom post iom. Tiel ni neniam perdis memfidon."

Tia memfido kondukis la ĉinajn briĝistojn al la venko en Azio: En la 90-aj jaroj, post la sukceso de la Ĉina Virina Briĝa Teamo en Azio, la Ĉina Vira Briĝa Teamo foje refoje gajnis en la Malproksim-Orienta Briĝ-Federacia Ĉampionado la ĉampionecon, kio preparis al ili vojon al Bermuda.

STELOJ EN LA MALPROKSIM-ORIENTA ĈAMPIONADO

En Malproksim-Oriento, ĉiam estas potencaj la Taibei-a Teamo de Ĉinio, kiu dufoje gajnis la mondan subĉampionecon, kaj la Indonezia Teamo, kiu foje okupis la duan lokon, venkante de la plej potenca teamo — la Itala Blua Teamo. En la Tria Azia-Pacifika Briĝa Konkurso la junaj ĉinaj briĝistoj profunde impresis per sia okulfrapa atingo en grupa konkurso. Nun oni eble forgesis la ĉampionon kaj subĉampionon de tiu konkurso, tamen ili memoras la mirindan ludon de la ĉinaj briĝistoj.

Kaj tiam la Ĉina Briĝa Teamo fariĝis ĉefa rivalo de la teamoj de Taibei kaj Indonezio en Azio.

"NENIAM SUBTAKSU ĈINOJN"

En 1990 okazis en Ĝenevo, Svislando, la Olimpika Briĝa Konkurso. La Ĉina Briĝa Teamo unuafoje aperis en ĝi. Post la grupa konkurso, la veterana ĉampiono — la Usona Briĝa Teamo ricevis privilegion elekti rivalon. La usonanoj elektis ĉinojn opiniante, ke ili ludos kun la lastaj kiel kun novaj trejnatoj.

Tamen la ĉinoj donis minacon al la kvar usonaj ĉampionoj: Post finiĝo de la unua sekcio, la ĉina teamo jam estis antaŭiranta per 30 IMP (Internacia Matĉa Poento)! En la sekvantaj tri sekcioj la usonanoj pene postkuris kaj finfine venkis la ĉinojn per sia sperto kaj tekniko. Post la konkurso la usonanoj ankoraŭ maltrankvilis: "Se ni antaŭvidus tion, ni certe elektus iun ajn teamon escepte de la ĉina." Ili plie atentigis la potencajn eŭropajn teamojn: "Neniam subtaksu ĉinojn."

Interese estas, ke kiam la ĉinoj, pro sia eminenta atingo, estis honoritaj de la Monda Briĝa Federacio per Majstraj Poentoj, ankoraŭ ne estis la Sistemo de

Majstraj Poentoj en Ĉinio.

MARŜI AL BERMUDA

En la 70-aj jaroj, la ĉin-devena usonano Charles Wei inventis kaj disvastigis en la tuta mondo la Precizan Trefan Sistemon: Li persvadis la mondnivelajn briĝistojn adopti lian sistemon; dank' al lia sistemo, la Taibei-a Briĝa Teamo de Ĉinio dufoje gajnis la duan lokon en la mondo; trejnita de li, lia edzino Katherine Wei fariĝis la unua ĉin-devena briĝa mondĉampiono... Tiel lia sistemo estis aprobita en la mondo.

Inspirataj de geedzoj Wei, la ĉinaj briĝistoj diligente sin trejnigis kaj ĝis nun la Ĉina Vira Briĝa Teamo jam dufoje eniris en la unuajn ok lokojn de la mondo, kaj la Ĉina Virina Briĝa Teamo dufoje okupis la duan lokon en la Monda Ĉampionado de Venecia Pokalo. En oktobro de 1995, Ĉinio sukcese gastigis la 32-an Mondan Teaman Ĉampionadon de Bermuda-pokalo kaj la 10-an Mondan Ĉampionadon de Venecia Pokalo. Sekve en Ĉinio multigis briĝ-amantoj kaj briĝmatĉoj, sinsekve aperis briĝkluboj, ankaŭ la Ĉina Briĝa Asocio komencis ellabori projekton de profesiigo.

La Ĉina Briĝa Teamo jam suriris la vojon al Bermuda. Ĉu la vojo estas glata? Ni atendas. ■

Paco-Kompanio servas al vi

La Paco-kompanio (Ĉinio) servas al investantoj, turistoj kaj fakuloj,

Importo kaj eksporto de komercaĵoj, internacia geedziĝo.

Registrita numero:
14896279-1

Adr.: Direktoro Ling Bo,
P. O. Box 2, CN-230001,
Hefei, Ĉinio.

Tel/Fax: +86-551-
2632545/-4484606

Belartaj konkursoj de UEA en 1998

La Belartaj Konkursoj de UEA denove invitas partoprenantojn por sep branĉoj. La rezultojn oni anoncos kadre de la Universala Kongreso en Montpeliero. (Tamen, la konkursado neniel estas ligita al partopreno en la UK!) La laŭreatojn atendas monpremioj, kiuj estas pli altaj ol antaŭe. Ĉiuj konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, ne publikigitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj:

Poezio: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo 200 x 65 tajpspacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Eseo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la UK: "Mediteraneo — ponto inter kulturoj". Premio "Luigi Minnaja" kaj du aliaj premioj.

Kanto: Teksto kaj melodioj povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio "An-Song-san" kaj du aliaj premioj.

Videobendo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo (vd. ĉe Eseo). Daŭro inter 15 kaj 60 minutoj. Sistemo VHS/PAL. Tri premioj.

Infanlibro de la Jaro: Originala aŭ tradukita libro, presforme aperinta en 1997. Unu premio.

Alsendo: Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 1998. Por videobendo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 1998. Ĉion oni sendu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

La konkursaĵoj (krom videobendoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La vera nomo kaj adreso estu en aparta koverto. Se eble, oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo, en kiu oni konkuras.

Premioj: Unua premio: 410 gld. Dua premio: 287 gld. Tria premio: 164 gld. Nova Talento (por la plej bona konkursanto antaŭe ne premiita) 287 gld. Infanlibro de la Jaro: 861 gld.

Publikigo: La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la Konkursoj.

Detala regularo haveblas kontraŭ unu respondkupono ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, aŭ retroŝte ĉe <uea@inter.nl.net>.

Ĉampionino en rulseĝo

Teksto de ZHAO XI

Fotoj de WANG LIQIANG


Ŝi estas sportistino en rulseĝo. Kelkajn monatojn post trejniĝo pri rapirado, ŝi partoprenis la 6-an Malproksim-Oriantan kaj Sud-Pacifikan Sportkunvenon de Kripluloj okazintan septembron de 1994 en Pekino kaj gajnis la ĉampionecon de virina rapirado.

Ŝi nomiĝas Qi Kaili kaj naskiĝis en sportista familio. Ŝia inĝeniero-patro estis estro de korbopilka teamo en sia juneco, ŝia patrino instruas en la Pekina Korpokultura Universitato. Influate de la gepatroj, ŝi amis sporton jam en la infaneco kaj prenis altosalton kiel ĉefan trejno-branĉon en sporta lernejo. Dank' al 10-jara trejnado, ŝi sukcese transsaltis la alton de 1.75 metroj en la Pekina Mezlernejana Sportkunveno en 1992 kaj gajnis la oran medalon pro altosalto. Poste ŝi fariĝis

Qi Kaili kaj ŝiaj familianoj



Mastrumado per komputero



Qi Kaili kaj ŝiaj koleginoj



studentino de alternejo, kun espero akiri pli grandan sukceson en altosalto. Tamen okazis al ŝi malfeliĉo en 1993. Foje en trejnado pri ŝarĝoportado, haltero falis kaj forte batis ŝian spinon, kaj tio kaŭzis al ŝi frakturon je la 11-a kaj 12-a torakaj vertebroj — ŝi paralizigis!

La akcidento ne frakasis ŝin. Pro operacio ŝi forlasis la lernejon por unu jaro. Reveninte la lernejon, malgraŭ malfacilaĵoj kaŭzitaj de la kriplajo, ŝi elspezis pli multe da tempo kaj energio en lernado. Finfine ŝi fariĝis licenciulo.

Poste ŝi trovis kontentigan postenon. En libera tempo ŝi sin dediĉis al sporto. Kiel membro de la Pekina Teamo de Enrulseĝaj Tablotenisistoj, ŝi partoprenis konkurson en Koreio.



Trejniĝo



Al laboro



Kangding hodiaŭ

Teksto kaj fotoj de LIU SIGONG

Aŭtune de 1997, antaŭ ol mi iros al Kangding, urbo de sudokcidenta Ĉinio, por intervjui, iu diris al mi: “Ĝi estas malriĉa, nevizitinda!”

Tamen mi venis tien. Kiam mi atingis ĝin, nova urbo eniris en miajn okulojn. Ĝi estas Kangding, centro de politiko, ekonomio kaj kulturo por tibet-nacianoj de nordokcidenta Sichuan-provinco.

La urbo ne estas movoplena, eĉ kun estiĝinteco, kiu ne akordiĝas kun moderna. Ĉirkaŭita de montoj, ĝi estas limigita je evoluo. Lernejo, hospitalo, ĉiovendejo kaj domego de poŝto kaj telekomuniko vice staras inter montoj, klara rivero trafluas









la urbon.

Kangding estas ekspluatanta siajn riĉfontojn por evoluigi ekonomion, speciale hidroelektron. Ĝi liveras elektron ne nur al la lokanoj, sed ankaŭ al Chengdu, ĉefurbo de Sichuan-provinco. Ĉiujare, ĝia enspezo de elektro okupas trionon de ĝia totala enspezo. Mi vizitis tie multajn montojn kaj valojn kaj vidis ke montanoj utiligas grandan falon de fluo de rivero por konstrui hidroelektrejojn. Tiuj tibet-nacianoj, kiuj lumigs per brulligno, riĉiĝas pro evoluigo de hidroelekto.

1. Lernantoj de naciminoritata mezlernejo en tibetlingva leciono
2. Tibet-nacia junulino laboranta en hidroelektrejo
3. Hidroelektrejo en Kangding
4. En bazaro
5. En centralo de longdistanca telefonio
6. Parto de Kangding



Ĉarmo de *huĉin*-istino

Ŝi laboris kiel solistino de la Ĉina Radia Nacia Orkestro jam 10 jarojn. En la ordinaraj tagoj ŝi aspektas kiel kvieta studentino, sed ludante kordinstrumenton sur scenejo, ŝi komplete kunfandiĝas en la muzikon, kiun kontente ĝuas la aŭskultantoj.

Ŝi nomiĝas Jiang Kemei. Kiam ŝi estis malpli-ol-10-jara, ŝi estis kortuŝita de muziko kaj tiam komenciĝis ŝia vivo de artisto. Aŭskultinte solon “Akvo de Rivero” ludatan per *huĉin*-o, ŝi emociiĝis ĝis larmoj. (*Huĉin*-o estas ĉina nacia du-korda arĉa instrumento. — La Trad.) Kvankam ŝi ne komprenis la enhavon, kiu konigas ke iu virino ploras ĉe rivero pro perdo de la edzo, tamen ŝi sentis ke la muziko estas malĝoja kaj kortuŝa. Tial ŝi decidis lerni por kortuŝi aliajn per la muziko...

Jiang eniris en konservatorion kun la infana sonĝo. Ŝia ludo ne nur kortuŝis multajn ĉinojn, sed ankaŭ okcidentanojn. En 1994 ŝi vizitis Portugalion kaj ludis portugalan popolkanton “Mevo” per *huĉin*-o. El la malĝoja sono oni ŝajne vidis belan mevon fluganta ĉien, mortonta... Kiam ŝi finis la ludon, la spektantoj ankoraŭ ne elliberigis sin el la malĝojo. Post silento ili varme aplaudis. Ili dankis la ĉinan artistinon pro ŝia bona kompreno kaj prezento de la portugala nacia muziko. Jiang foje kaj refoje revenis al la scenejo por danki aplaudon de la spektantaro. Ŝi diris ke korda muziko de Ĉinio estas intima al la vivo. Ĝi estas taŭga por esprimi la homan senton. Ja en tio estas ĉarmo de *huĉin*-o.

Jiang faras ĉion eblan por disvolvi la ĉarmon de *huĉin*-o. Ĉina *huĉin*-o havas 5 specojn, ĉiu kun 2 kordoj kaj unu arĉo, tamen pro diferenco de materialoj, strukturoj kaj ludmanieroj ili havas proprajn karakterizaĵojn. La muziko ludita per *banhu*-o de norda Ĉinio estas patosa, tiu per *gaohu*-o de suda Ĉinio — delikata, tiu per *ginghu*-o por pekina opero — kadenca, tiu per *erhu*-o — lirika, tiu per *gonghu*-o similas al mezosoprano. En Ĉinio multaj povas ludi unu el la 5 specoj de *huĉin*-o,



S-ino Jiang Kemei

sed malmultaj bone ludas 5 specojn. Tamen Jiang Kemei en la *banhu*-a fakultato en la Centra Konservatorio de Ĉinio studis la 5 specojn, kaj antaŭ diplomiĝo, ŝi donis specialan solo-koncerton, kie ŝi ludis la 5 specojn. Maljunaj muzikistoj kun miro rimarkis, ke ŝi havas riĉan kaj distingiĝan esprimkapablon.

Ekde 1992, Jiang estis trifoje invitita al Internacia Muzika Tago en Aomen, tiam ŝi ne nur donis solo-koncerton, sed ankaŭ prezentis kune kun Aomen-a orkestro kaj okazigis kurson de arto. En tiuj tagoj diverslandaj kaj diversnaciaj homoj ofte sursceniĝis por rigardi la diversajn *huĉin*-ojn malantaŭ Jiang. Ili ne sciis kiel ŝiaj fingroj faras diversajn sonojn sur du kordoj: lirlado, pluvado, birdokanto, homa krio kaj ĉevala henado, tamtamado kaj gongado. En 1995 en Francio iu 85-jara artisto, premante ŝian manon, diris: “Bonege! Via ludo rememorigis min pri Ĉinio, pri la antikvaj ĉinaj filozofoj Zhuangzi kaj Laozi.”

Eble la sono de *huĉin*-o iagrade konkordas al la spirito de la du filozofoj. Jiang malalte taksas famon kaj profiton. Ŝi opinias, ke la artistoj unue estas veraj homoj, malsamaj personecoj kondukas al malsamaj artoj. Tial ŝi sincere akompanas *huĉin*-on. Foje en Tajlando spektantaro ĝuis ŝian belan kaj emocian ludon, tamen neniu sciis ke ŝi febris kaj oni faris al ŝi pogutigadon nur antaŭ kelkaj minutoj en hospitalo...

Antaŭtagmeze de iu tago, en angulo de provluda halo, prenante matenmanĝon, Jiang ricevis mian intervjuon. Ŝi kun honteto diris: “Pardonon, hodiaŭ mi ellitiĝis malfrue, ĉar mi enlitiĝis nur je la 3-a.” Multfoje ŝi prezentis en Pekino antaŭtagmeze, posttagmeze ŝi veturis al alia urbo kaj post tio tuj flugis al koncertejo... Apud ŝi sidis ŝia edzo, elstara zimbalonisto. Ili estas kunlernantoj kaj ankaŭ kolegoj, kune vivis jam 9 jarojn. Li diris al mi: “Jiang amas arton kaj ankaŭ la familion. Kiam mi partoprenis konkurson, ŝi preparis multajn bongustaĵojn por mi...” Ŝi kapjesis: “Mi tutkore subtenas lin en ekzercado. Li gajnis tion, kion li devis gajni. Li gajnis la unuan lokon en konkurso.” La geedza paro ankoraŭ ne havas infanon, sed Jiang diris: “Ni certe havos infanon, ĉar ni ambaŭ amas ĝin.” ■

SAN-PROTEKTADO EN PRINTEMPO

LAŭ la ĉin-medicina teorio la homoj konkordas al la ĉielo. En printempo ĉio en la mondo revigliĝas, la pozitiva faktoro *jang* en la homa korpo komencas disvolviĝi, kaj la vitala energio kaj sango cirkulas en ĝi pli vige. Tial en printempo oni devas konkordi al la natura leĝo en la ĉiutaga vivo, manĝado, humoro k.a. Oni devas observi tiun leĝon, por ke la rilato inter homoj kaj klimato estu en ekvilibro cele al efika san-protektado.

En printempo oni sentas sin laca, dormema kaj malvigla. Vintre pro ekscito de malvarmo malpliĝas la sango cirkulanta en la haŭtaj kapilaroj kaj pliĝas la sango cirkulanta en la cerbo kaj visceroj, sed printempe pro leviĝo de la temperaturo dilatiĝas la haŭtaj poroj, kien cirkulas pli multe da sango, dum la oksigeno liverita al la cerbo kompare malpliĝas, kaj sekve de tio aperas la supre menciitaj fenomenoj. Por likvidi ilin unue oni devas frue enlitiĝi kaj frue ellitiĝi kaj havi ankaŭ sieston. Due, oni devas ventoli la ĉambron por teni sufiĉe da oksigeno en ĝi, ĉar malpliĝo de oksigeno kaj pliĝo de karbona dioksido kaj aliaj malutilaj gasoj faras la homojn dormemaj. Trie, oni devas fari pli da sportoj. Sed dum sportado oni devas movi sin malrapide kaj milde. Tiam estas rekomendinda promenado eksterdome en lozaj vestoj, kiu tre helpas al utiligo de

oksigeno kaj al digestado. Oni devas promenadi kviete, senzorge, kaj dum promenado oni povas froti siajn manojn, ritme spirante, knedi la nukon, bruston kaj ventron, frapi la talion, dorson kaj eĉ la tutan korpon. Oni povas promenadi rapide aŭ malrapide, longe aŭ mallonge laŭ sia sanstato, sed neniel estu tro laca. Oni devas promeni konstante por akiri deziratan efikon.

En printempo la pozitiva faktoro *jang* kreskas, dum la negativa faktoro *jin* kaj malvarmo ankoraŭ ne cedis sian lokon, tiam la frua demeto de vatitaj vestoj estas malutila al la sano kaj povas kaŭzi gripon, trakeiton, pulmiton, epidemian encefaliton, morbilon, parotiditon k.a. La ĉina sanprotektata teorio avertas, ke oni ne devas frue demeti vatitajn vestojn, sed devas porti vestojn laŭ ŝanĝiĝo de la vetero.

Koncerne la dieton, printempe oni devas manĝi pli da nutroriĉaj, facile digesteblaj kaj apetitvekaj manĝaĵoj, kaj ne tro tonikajn kaj tro akrajn manĝaĵojn. Estas tre utile, ke oni konvene uzas vinaĝon en preparado de pladoj.

Fakuloj de ĉina san-protektata teorio opinias, ke la homaj visceroj havas konkordan rilaton kun la kvar sezonoj de la jaro kaj printempo konkordas al la hepato, tial en printempo oni devas doni grandan atenton al hepat-protektado. La funkcio de la hepato ĉefe kuŝas en reguligo de la cirkulado de sango kaj vitala energio. Se la

hepato funkcias malbone, do perturbiĝas la cirkulado de sango kaj vitala energio en la tuta korpo, kio kaŭzas hipertension, dismenoreon, perturbiĝon de la funkcio de galdukto kaj digesto kaj aliajn malsanojn, tial bone protekti la hepaton tre utilas al la cirkulado de sango kaj vitala energio. Pere de normaligo de la hepata funkcio reguligi la cirkuladon de sango kaj vitala energio estas unu el la gravaj rimedoj por kuraci multajn malsanojn laŭ la teorio de la ĉina medicino.

Printempo ja estas tempo, kiam oni estas facile atakita de diversaj epidemiaj malsanoj. Printempe revigliĝas ĉiuj kreskaĵoj, inkl. de mikroboj kaj virusoj. Pro malboniĝo de la homa sanstato, malordiĝo de la ĉiutaga vivo oni estas facile atakita de epidemia encefalito, morbilo, parotidito, akuta oftalmito kaj aliaj infektaj malsanoj.

Printempe pro sekeco oni facile suferas de gorgaj malsanoj. Por preventi la malsanojn, oni devas manĝi pli da rafanoj, bambuaj ŝosoj kaj fruktoj. Kaj plie oni devas ofte ventoli la ĉambron, ŝanĝi vestojn kaj litkovrilojn, malofte viziti publikajn lokojn, gargari sin per milda salakvo kaj manĝi ajlojn. Atakite de parotidito, oni devas ripozi en la lito, trinki pli da akvo, preni manĝaĵojn facile digesteblajn, ne manĝi oleozajn kaj akrajn manĝaĵojn nek preni acidajn manĝaĵojn, kiuj ekscitas la parotidojn kaj pligravigas la malsanon. ■

(Daŭrigo de p. 9)

senenue kaj instruu senlace, amu la lernantojn, vorte instruu kaj kondute influu ilin. Li admonis la lernantojn, ke ĉe plenumo de virto ili ne devas cedi al sia instruisto. Influate de konfuceanismo, en Ĉinio kaj iuj Orient-Aziaj landoj formiĝis bona tradicio alte taksati edukadon, promocii ŝtato-ficistojn laŭ ilia klereco, nomumi ŝtato-ficistojn post ekzameno. Konfuceanismo ludis gravan rolon por levi la kulturan kaj moralan nivelon de la homoj, levi ilian klerecon, stabiligi la socion kaj konservi eternan pacon de la lando. En la moderna socio la edukado estas pli grava ol antaŭe. Nun multaj landoj prenas disvolvon de sciencoj kaj eduko kiel fundamentan politikon de sia administrado. Konfuceanismo, tre utila al la moderna edukado, ludos certagradan rolon en la estonteco.

Konfuceo naskiĝis en la 6-a jc a.K. Tiam en Ĉinio multaj regnoj batalis unu kontraŭ alia. La tuta socio troviĝis en ĥaoso. Por bonordigi Ĉinion formiĝis mul-

taj skoloj. Energie propagandante sian doktrinon, Konfuceo ankaŭ lernis de taoismo kaj legalizistoj. Li proponis, ke diversaj kulturaj kaj akademaj skoloj devas lerni unu de alia. Ankaŭ la homoj devas lerni unu de alia. Li diris: "Kiam mi iras kune kun du aliaj homoj, mi certe havas mian instruiston inter ili. Mi elektos liajn bonajn kvalitojn por sekvi kaj liajn malbonajn kvalitojn por eviti."

Ni, esperantistoj, pledas por unu granda rondo familia kaj granda harmonio de la mondo. Ankaŭ Konfuceo pledis por la harmonia kunvivado de ĉiuj nacioj. Li diris: "Mia politika principo estas ke la tuta mondo staru por plena mal-egoismo. Oni devas elekti eminentajn kaj kapablajn homojn por administrado de la ŝtato. Oni devas fidi unu alian kaj vivi en eterna harmonio. Oni ne devas intimi sole kun siaj propraj familianoj, nek ami sole siajn proprajn infanojn. Oni devas fari tiel, ke la maljunuloj vivu feliĉe, la plenkreskuloj plene disvolvu sian talenton, la geknaboj sane kresku,

kaj la orfoj, vidvoj, kripluloj kaj malsanuloj, ĉiuj havu vivrimedojn. Oni ne devas forĵeti varojn, nek teni ilin ĉe si, sed utiligi ilin. Neniu domaĝu sian forton por la publika bono. Neniu klopodu sole por sia propra afero. Ne estu insido, nek ŝtelo nek rabo. Se tio estos realigita, la popolo povos eldomiĝi sen ŝlosi la pordon. Tio ja estas granda harmonio." Nun la ĉina popolo penas por efektivigi tian socion.

Konfuceo forpasis en la jaro 479 a.K., sed lia doktrino estas komuna spirita riĉaĵo de la tuta homaro. Multaj el liaj opinioj estas utilaj por fari la homojn noblaj kaj civilizitaj kaj la socion bonorda kaj harmonia. Prave diris iu fama sciencisto: "Por bone vivi en la 21-a jc., la homoj devas asimili la spiritajn nutraĵojn ankaŭ el la verkoj de Konfuceo. ■

* Prof. Kong Xianglin, la 75a-generacia posteulo de Konfuceo, faris tiun prelegon dum la 82-a UK. Ĉi tie ni publikigis lian prelegon mallongigitan.

ĈINAJ METIARTAĴOJ



Ruĝa skatolo kun gravuritaj drakoj kaj ondoj

Antaŭ 6 000 jaroj, en Ĉinio aperis lakitaj metiartaĵoj kun nigra kaj ruĝa koloroj. Poste evoluis lakarto kaj artistoj bone utiligis naturan lakon kaj post prilaborado kaj kolorigado ellaboris diversajn lakitajn metiartaĵojn ne nur por ornamado, sed ankaŭ por praktika uzo.

La lakita metiartaĵo "Ruĝa skatolo kun gravuritaj drakoj kaj ondoj" estas cilindra. Sur ĝiaj kovrilo kaj eksteraĵo estas gravuritaj drakoj kaj ondoj. Ĝi estas tiel delikata, ke la ondoj eĉ dikas kiel haroj. Ĝi estis farita en Qing-dinastio (1644-1911).






Preĝejo kun sonorilturo en Hakarp, Svedio de **INGRID ARWEDSON** (Svedio)



Riegersburgo de Aŭstrio de **HERBERT KAMPL** (Aŭstrio)

ISSN 0032-4361



世界语《中国报道》一九九八年第三期

(本刊代号：二—九—一五) 国内统一刊号：CN11 1339/G2